

1978 decembro

71-a jaro

Numero 876 (12)

Eliras monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

Universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
Nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Memoru, ke la Zamenhofa tago estas la Libro-tago!

Vi trovos

ke malgraŭ la fakto, ke la rubriko "Oficiala informilo" (p. 223) estas ĉi-foje escepte mallonga, la tuta numero aspektas kiel tiunoma rubriko. Duonon de la numero okupas "neinteresaj oficialaĵoj" — Statuto kaj statutprojekto. Hal-tigu, tamen, dum momento tiajn pensojn! Klopodu unue respondi ĉi tiujn demandojn: Ĉu tio ĉi estas revuo de kiu vi atendas tiun agrablan mensotiklon dum digesta siesta duondormo en brakseĝo postmanĝe? Ĉu pli konvenus plenigi la paĝojn per mondumaj blagoj, anekdotoj pri idiotoj, receptoj pri ku-koj el fragoj kaj pureo el karotoj? Ĉu ni je krucenigmoj svarmu, per stranda modo de kravata nodo garnu la paĝojn? Ĉu mankas al vi tiaj legaĵoj en la ge-patra lingvo? (Ne diru nun, ke vi ĉiuj estas kvazaŭ denaskaj esperantistoj!) Ĉu vi abonas la revuon pro amuziĝo, kvazaŭ serĉante ŝatokupan deserton, post longa, mongajna kaj enuiga profesia monato? Ni ĉiam havis aliajn pensojn pri vi. Ni servas al vi ĉiumonate ĉi tiujn dudek paĝojn kiel aperitivon por via se-rioza aktiveco en ĉi tiu revolucia movado, al kiu vi apartenas, ne hazarde kaj ŝatokupe, sed konscie kaj plenforte. Se estas tiel — Kaj estas, ĉu ne! — jen la Statuto kiel ĉefmanĝo sur la ĉi-monata plado. Legu ĝin atente kaj trankvile. Relegu. Pesu ĉiun vorton. Komparu. Reverku, se necese. Memoru, ke ĝi estas dokumento pri vi kaj por vi. Ĝi povas fariĝi dokumento ankaŭ de vi, se vi vo-las kuntajlori tiun ĉapon por via kapo. Multloke la nova statutprojekto estas tute ekscita. Ĝi kuraĝe difinas plurajn aferojn pri kiuj oni dum la lastaj jaroj multon onidiris. Cetere, estas decembro kaj tial — Ĝis la venonta jaro!

Enhavo

- 209 Renovigo de la Statuto de Universala Esperanto-Asocio: Pro neŝanĝemo ni riskas stagnon (Humphrey Tonkin)
- 213 Statuto kaj statutprojekto (komparcela publikigo de la valida Statuto de UEA kaj de nova statutprojekto)
- 219 Recenzoj: "Gudrun" (Alec Venture); "Epifanio" (Probal Daŝgupto); "Sociopsikologio kaj grupodinamiko de la Esperanto-movado" (Peter G. Forster)
- 220 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 221 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 223 Nekrologoj (G.R. Johansson, R. Lavallée, S. Minault, K. Offerdal, I. Runfeldt, Y. Thooris, H.C. Timmer)
Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
Ekzameno E (Bernard Golden)
- 224 Anoncetoj
- 225 Indekso de la Jarkolekto 71 de la revuo "Esperanto"
- 228 Anonco

La kovrilo

La kovrilan foton ni dankas al Zoltán Fejér, kiu supozeble havas debetan sal-don ĉe la budapeŝta damo, kiu konsentis pozi por li. Verŝajne, tamen, tiel Zoltán kiel ni, ŝuldas la foton al la fakto, ke Hungara Esperanto-Asocio dum la lastaj monatoj transformiĝas en veran librofabrikon, kiu eldonas proksimu-me unu libron monate. En la movadaj eldonaj cirkonstancoj tio certe estas aplaŭdinda fortostreĉo, des pli ke la budapeŝtaj libroj nutras ĉefe la soifan orienteŭropan merkaton, kiun la eldonaĵoj de TK/Stafeto, Omnibuso, Pirato, Dansk Esperanto-Forlag, Gabrielli, Kardo, Sarlanda Esperanto-Ligo, brazilaj eldonejoj, UEA ktp. igas nur salivumi pro la nesupereblaj transpagaj baroj. Foje ni aludis la malaltan teknikan nivelon de la libroj de HEA. Nun estas tempo atentigi, ke la plej freŝaj titoloj el Budapeŝto estas belaj kaj bonkvali-te presitaj. Ni staras antaŭ la Zamenhofa Tago, kiu estas ankaŭ la Libro-Tago. Eĉ se vi mem ne interesiĝas pri aĉeto de nova libro, vi ja havas geamikojn, feliĉigeblajn per librodonaco. La Libroservo de UEA atendas viajn donacajn instrukciojn. Antaŭdankon nome de viaj geamikoj kaj nia Libroservo!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Ne-movadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovril-paĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (kon-to n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tele-fono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri in-formado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefo-no (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona aga-do: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, finan-coj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Miła-nówek, Pollando; tel. 58-37-08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-ino Flora Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hunga-rio.

Pro neŝanĝemo ni riskas stagnon

Post nia ĉefartikolo en la numero de marto 1975, la renovigo de la Statuto de UEA plurfoje — pretere — menciigis en ĉi tiu revuo. Ni tiel volis atentigi, ke oni daŭre okupiĝas pri la demando. Tiuj avaraj vortoj neniel povis speguli la horojn, tagojn kaj monatojn, kiujn al la modernigo de la Statuto dediĉis la kompetentaj organoj de la Asocio. La rezulto de tiu plurjara laboro nun estas antaŭ la membraro de UEA. La plej grava parto de la statuta laboro ankoraŭ atendas plenumon fare de la tuta membraro de UEA.

EN APRILO 1908 estis formale aprobita la statuto de nova monda organizaĵo, Universala Esperanto-Asocio, kies celo estis: "la plifaciligo de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de forta ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj". Tra la jaroj tiu "plifaciligo de la... rilatoj inter diverslingvanoj", formulita de Hector Hodler, restis fundamenta principo de la agado de UEA kaj daŭre respeguliĝis, tra ĉiuj ŝanĝoj, en la statuto de la Asocio. Hodiaŭ la Statuto deklaras, ke la Asocio celas interalie "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj", kreskigante "inter siaj membroj fortikan senton de solidareco".

Same longedaŭra estas alia principo starigita de Hodler. "UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco", deklaris la unua statuto de UEA. Aliĝis al tiu listo de neŭtralecoj en 1933 la formulo "kaj sociaj demandoj" — kaj poste aldoniĝis ankaŭ la neŭtraleco rilate al raso, tiel ke hodiaŭ ni legas, ke "UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj".

La nuna Statuto estas tamen fundamente alia ol tiu de 1908 kiam temas pri la strukturo de la Asocio. UEA de tiu frua epoko estis organizaĵo de individuaj membroj:

eĉ en postaj jaroj, kiam la neceso de federacia strukturo inter landaj Esperanto-asocioj fariĝis pli kaj pli evidenta, UEA daŭre restis organizaĵo, kies baza unuo estis la lokaj Esperanto-grupoj, kiuj elektis siajn "delegitojn", kiuj siavice elektis la gvidajn organojn. Apud tiuj delegitoj ekzistis ankaŭ individuaj membroj. Kiam en la jaro 1936 estis fondita la Internacia Esperanto-Ligo, kiu formiĝis apude (kaj opozicie) al UEA, IEL fariĝis organizaĵo de landaj asocioj. La rekuniĝo de UEA kaj IEL en 1947 postulis lertan manipuladon por konservi en harmonio, en unu organiza strukturo, la trajtojn de ambaŭ organizaĵoj. La nova, postmilita UEA havis sian delegitan reton, hereditan de la malnova UEA, apud la sistemo de landaj asocioj konata en IEL. La hodiaŭa Statuto de UEA ankoraŭ portas ĉiujn historiajn postsignojn de tiu, tiam tre necesa sed ne ĉiam plene oportuna, kombino de du organizaj strukturoj.

Kvankam la Statuto estis ŝanĝita en la periodo 1954-55, ĝi restas esence sama kiel tiu de la kunfandiĝo. Nun, tridek jarojn post la kunfandiĝo, ni estas en pozicio de nove trarigardi la Statuton kaj modernigi ĝin, por respondi al la novaj bezonoj. La vundoj el la periodo de la divido inter IEL kaj UEA jam delonge resaniĝis, kaj ne plu necesas reteni strukturajn elementojn en la Asocio esence kontraŭdirajn, nur pro la historia kontinueco.

Problemoj ĉe la nuna Statuto

La neoportuneco de kelkaj elementoj de la nuna Statuto estas jam delonge rekonata — ne nur de la nuna gvidantaro de la Asocio sed ankaŭ de antaŭaj. Esence, tiuj neoportunecoj estas resumeblaj jene:

1. La nuna organiza strukturo donas nur tre limigitajn rajtojn al la individuaj membroj. Ili apenaŭ havas influon en la elekto de la Komitato, la ĉefa organo de la Asocio. La plejparto de la anoj de tiu komitato estas elektata de la landaj asocioj (komitatanoj A) aŭ la delegitoj (komitatanoj B). Sed la plejparto de la individua membraro ne partoprenas la balotadon. Necesas ankaŭ aldoni, ke, kvankam la delegita reto bone funkcias kiel komunika sistemo inter niaj membroj, ĝi ne plu estas reprezenta en la senco de la frua periodo de UEA, kiam lokaj Esperanto-grupoj elektadis siajn



La individua membraro finance vivtenas la Asocion: Tial la projekto de la nova Statuto antaŭvidas pli influan rolon por la individuaj membroj, ol estas kongresaj aplaŭdoj.

delegitojn kaj la delegitoj reprezentis la interesojn de tiuj grupoj en la internacia forumo. Malmultaj grupoj ankoraŭ elektas siajn delegitojn. Plejparte la delegita reto ekzistas sendepende de la lokaj grupoj. Sekve, ĝi restas **serva** strukturo, sed ne plu estas **reprezenta** strukturo.

2. En la nuna organiza strukturo ne ekzistas formala loko por TEJO. La moderna TEJO datiĝas de la periodo 1956-57, kiam ĝi estis restarigita kiel junulara sekcio de UEA. Tiu formala rilato pliintimiĝis en 1963. Kvankam la rilatoj inter TEJO kaj UEA estas nun en periodo de trankvileco kaj harmonio, okazis en pasintaj jaroj kelkfoje streĉitecoj, ĉefe pro disputoj pri decidopovo, inter la organoj de UEA kaj tiuj de TEJO. Estus konsilinde formale rekoni la rolon de TEJO en la strukturo de UEA kaj doni al ĝi statute difinitan voĉon en la aferoj de la Asocio.

3. Necesas reguligi, sed neniel malfortigi, la starpunkton de la Asocio rilate neŭtralecon. Kiam oni en Berno ellaboris la nunan Statuton de UEA, oni formulis la paragrafon pri neŭtraleco surbaze ne de la malnova difino de Hodler (kiu aludis simple al religio, nacieco kaj politiko) sed laŭ la Interkonsento de Kolonjo el 1933, kiu aldonis, ke UEA estas neŭtrala ankaŭ rilate al sociaj problemoj. Kiel profesoro Ivo Lapenna siatempe prave diris, tiu formulo estas esence maltaŭga, ĉar la lingvo mem estas socia institucio kaj sekve ne eblas, ke UEA, kiu okupiĝas pri lingvaj problemoj, povus en tiu senco resti neŭtrala. Aliflanke, simpla forigo de la frazero "sociaj problemoj" povus facile dilui la esencan celon de UEA, kiu estas solvi la **lingvan** problemon, ne aliajn sociajn problemojn. Paralelaj malglataĵoj leviĝas en la rilato inter la centra UEA kaj la landaj asocioj, kies internaj bezonoj ofte diktas vojon iom alian ol tiu, kiun ili sekvas en la internacia sfero. La principo de neŭtraleco, laŭ profesoro Lapenna en *Esperanto en perspektivo* (p. 560), estas aplikata en UEA "prudente elaste". "Io, kio estas rigardata kiel tute normale neŭtrala en unu politika medio", li aldonas, "povas esti konsiderata kiel politike neneŭtrala en alia medio". Sekve, "rigore observante la reformulitan, vastan principon de neŭtraleco por UEA kiel tia, oni devis" en la moderna periodo de UEA "kompreneme rilati al kelkfojaj devojiĝoj en unuopaj landoj". Kvankam tiu principo estas ja diktata de la prudento, ĝi facile povus esti konsiderata malobservo de la Statuto — kiel ja ĝi estis konsiderata de tempo al tempo en la lastaj jaroj. La prudento diktas, ke ni estonte evitu la problemon per reformulo de la koncerna paragrafo de la Statuto, ne por ŝanĝi la praktikon de UEA sed por konformigi la Statuton al la praktiko kaj tiel forigi tiujn problemojn de interpretado. Aliflanke, la neŭtraleco de la internacia UEA devas resti strikte observata.

4. Necesas konformigi la agadon de la Estraro al la preskriboj de la Statuto. La nuna Statuto tre specife disdividas la funkciojn de la unuopaj estraranoj. En la praktiko, la talentoj kaj laborkondiĉoj de la unuopaj

estraranoj ofte postulas iom alian disdividon ol preskribas la Statuto. Tiu strikta statuta preskribo montriĝis nenecesa stumblilo al la efika laboro de la Estraro. Ankaŭ la statuta preskribo, ke la estraranoj loĝu proksime al la Centra Oficejo, havis sencon en la periodo de ŝipvojaĝoj kaj malrapidaj poŝtaj ligoj, sed en la epoko de aviadiloj kaj internacia telekomunikado ĝi ŝajnas nenecese limigi la liberecon de niaj membroj en landoj malproksimaj de la Centra Oficejo. Plia demando, kiu fariĝis aktuala en 1974, kiam la nova prezidanto anoncis sian intencon resti en tiu ofico dum maksimume nur du sinsekvaj periodoj, estas


S-ro Uwe Joachim Moritz antaŭ la Komitato en Ateno: Li estis la ĉefa animanto kaj kunordiganto en la Komisiono pri Statuto kiu dum sia dujara funkciado (1974-1976) faris amason da antaŭprepara laboro, kiu rezultigis la statutan materialon en ĉi tiu numero de la revuo. ◦



eventuala limigo de la deĵorperiodo de la prezidanto. Kvankam UEA estas nun pli ampleksa kaj komplika organizaĵo ol ĝi estis en 1947 (en tiu periodo estis nur 19 aliĝintaj landaj asocioj; nun ekzistas 40), en la praktiko estas tre malfacile sekurigi la regulan alfluron de novaj talentoj al la pintaj organoj de la Asocio, ĉar neeviteble en tiu intima medio la personaj interrilatoj miksiĝas kun la objektiva juĝkapablo, kaj facile homoj restas sur siaj postenoj nur pro tio, ke neniuj deziras ofendi ilin per ŝanĝo. La ebleco fari ŝanĝojn sen samtempe ofendi niajn kolegojn (kaj sekve kaŭzi perturbojn en la centraj organoj) estas ja tre limigita. Se ni statute malhelpus la daŭran okupon de la prezidanta seĝo fare de la sama homo, ni gajnus plurajn avantaĝojn. Unue, ni malfermus al niaj prezidantoj la eblecon transiri al aliaj laboroj post sia prezidanteco. Nuntempe ŝajnas prezentiĝi nur du vojoj: aŭ retiriĝi komplete, aŭ submetiĝi antaŭ la okuloj de la publiko al la impreso, ke okazis "ŝtatrenverso" aŭ ke oni malpromociiĝis. Se oni limigus la deĵorperiodon, fariĝus tute nature, ke eksa prezidanto fariĝu simpla komitatano aŭ estrarano, aŭ ke li/ŝi elektiĝu post sia deĵoro vicprezidanto. Tio ankaŭ malfermus la prezidantecon pli facile al homoj, kies kariero estas ankoraŭ en plena disfloro, sed kiuj estas pretaj interrompi ĝin dum limigita periodo. Ili ne sentus sin sub morala

premo daŭre restadi, kvazaŭ per sia ekŝigo ili perfidus la Asocion. Ĝi certigus regulan alfluon al la Estraro de homoj pretaj prezidantiĝi. Ĝi malpliigus la sim-bolan efikon de la nacieco aŭ profesio aŭ raso de la prezidanto. Aliflanke, ĝi malhelpus la kontinuecon de la laboro. Sed, se ŝanĝiĝo riskas mankon de kontinu-eco, manko de ŝanĝiĝo riskas stagnon.

5. Necesas plani por la estonteco. UEA estas kreskan-ta organizaĵo. Kvankam la membronombro de la Asocio restis relative stabila en la lastaj jaroj, ĝia geo-grafia disvastiĝo draste ŝanĝiĝis, kaj la nombro de



homoj aktivaj en la centraj organoj grandskale pli-grandiĝis. Laŭ la nuna Statuto, landa asocio kun vere granda membronombro povus facile superregi la Komitaton. Ekzemple, asocio kun 10 000 membroj havus, laŭ la nuna preskribo, dek komitatanojn (el proksimume sepdek anoj de la nuna Komitato). Ŝajnas konsilinde ŝanĝi tiun sistemon por ebligi gradigitan (t.e. laŭŝtupan) kreskon en la nombro de komitatanoj.

La reviziado de la Statuto

La laboro super revizio de la nuna Statuto komenciĝis en 1974, kvankam jam plurfoje antaŭ tiu jaro la gvi-dantoj de la Asocio atentigis pri la neceso modifi plurajn erojn en la Statuto, kiuj malaktualiĝis aŭ fariĝis nepraktikaj. En sia kunsido de la 3a de aŭgusto 1974, la Komitato elektis kvarpersonan Komisionon pri Statuto (s-roj L. Anjer, I. Schleicher kaj U.J. Moritz, kaj d-ro L. Röhl). Ĝi havis la taskon vaste diskutigi la demandon kaj prezenti reviziitan tekston al la Estraro. El tio sekvis ĉefartikolo en la revuo (marto 1975), publika kongresa kunsido (1975 07 29) kaj publika kunsido de la Komisiono pri Statuto en Ateno (1976), plus aro da diversaj aliaj diskutoj kaj pensinterŝanĝoj. Intertempe, en 1975, la mandato de la Komisiono estis renovigita kaj oni aldonis al ĝia membraro s-ron H. Gorov.

Post voĉdono de la Komitato kaj ĝenerala voĉdono de la membraro, la malnova Statuto de UEA estis jure renovigita kiam ĝia periodo de valideco finiĝis la 27an de aprilo 1976.

Dum la kongreso en Ateno, en 1976, la Komitato havis okazon pridiskuti statutproponon verkitan de s-ro Moritz kaj esprimi sin pri kelkaj bazaj principoj de la de li antaŭvidita statuto. La Komitato tamen decidis redoni la demandon al la Estraro, senŝargigan-te la Komisionon kaj dankante ĝin pro la farita laboro. La estraranoj E.L.M. Wensing kaj E.J. Woessink ricevis la taskon en la Estraro prepari novan skizon de la komenca parto de la Statuto. Tiu estis diskutita de la Estraro, sed ne fintraktita ĝis la fino de la mandato en 1977. Surbaze de la laboro de s-ro Moritz kaj la Komis-iono, kaj de la antaŭa Estraro, d-ro H. Tonkin ellaboris plian statutprojekton, kiun la nova Estraro neformale traktis en aprilo 1978. Post kelkaj modifoj, ĝi estis principe akceptita de la Estraro en junio 1978 kaj plusendita al la Komitato.

Dum la 63a Universala Kongreso en Varno, la Komi-tato pritraktis la tekston pludonitan de la Estraro en du kunsidoj, faris kelkajn ŝanĝetojn, sed ne sukcesis fini sian laboron. Konstatante, ke detala pritrakto de la propono ne estos ebla en la daŭro de la Kongreso, kaj dezirante ne prokrasti la pluan diskuton ĝis la venonta jaro, la Komitato, preskaŭ unuanime, decidis "pludoni la projekton al la membraro kaj starigi komi-sionon, kiu kolektos la opiniesprimojn de la membraro kaj gvidos la statutan laboron dum la venonta jaro ĝis Lucerno." Pri la demando, ĉu la nuna statutprojekto "formas bonan bazon por definitiva teksto", la opi-nioj en la Komitato estis tre dividitaj: tiusenca rezolucio venkis per nur unu voĉo.

Vi do legas ĉi tie tekston neniel definitivan. Ĝi estas nur propono, sen (aŭ preskaŭ sen) oficiala aprobo. La celo de la publikigo estas doni al la membraro okazon reagi al la teksto, levi demandojn, esprimi opiniojn,

Inter la 10a kaj 15a de decembro ĉi-jare: Semajno de homaj rajtoj kaj Esperanto

Ĉu via loka Esperanto-grupo jam faris planojn kaj antaŭpreparojn por solene marki la 30an datrevenon de la Universala Deklaracio de Ho-maj Rajtoj kaj tiuokaze atentigi pri ligoj inter la Internacia Lingvo kaj Homaj Rajtoj? (Vidu niajn numerojn de oktobro kaj novembro).

kaj mem inter si diskuti la implicojn de eventualaj statutŝanĝoj. Intertempe, kompreneble, regas la malnova Statuto kaj neniel okazos ŝanĝoj sen la oficiala aprobo de la membraro, esprimita per la ĝenerala voĉdono.

Nia nuna procedo

Ni intencas procedi jene: Bonvolu sendi, kiel eble plej rapide, eventualajn viajn komentojn al la adreso:

Komisiono pri Statuto, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Ili estu kiel eble plej koncizaj kaj precizaj. Se eble (kvankam ne nepre), sendu ilin en kvar ekzempleroj. La Komisiono (kiu konsistas el d-ro Tonkin, s-ro Hamann kaj s-ro Staszczak) faros raporton surbaze de tiuj respondoj. La raporto aperos espereble en la aprila numero de la revuo. Ĝi sendiĝos ankaŭ al la komitatanoj. Post tio, la membroj denove havos okazon reagi al la raporto, kaj iliajn reagojn, en resumita formo, la Komisiono pludonos al la Komitato ĝis la Universala Kongreso en Lucerno. Necesas aldoni, ke la rolo de la Komisiono ne estas defendi tiun aŭ alian pozicion sed redoni al la membraro ekvilibran resumon de la opinioj prezentitaj. Viajn respondojn bonvolu direkti al Roterdamo prefere ĝis la mezo de januaro, kaj plej malfrue ĝis la fino de tiu monato.

En Lucerno la Komitato denove pritraktos la statutproponon, havante ĉemane la ĝeneralajn opiniojn de la membroj. Se ĝi atingos interkonsenton pri modifoj de la nuna Statuto, la nova teksto estos submetita al ĝenerala voĉdono kaj ni povos antaŭvidi ĝian ekvalidiĝon antaŭ la UK en Stokholmo en 1980. En Stokholmo necesos modifi la Ĝeneralan Regularon por konformigi ĝin al la Statuto.

La nuna projekto

La nuna statutprojekto estas tre konservative ellaborita. Oni celas reteni la formon de la nun valida Statuto kaj konservi ĝis tre alta grado la organizan strukturon kaj bazajn trajtojn de la Asocio. Ĉi tie ni donas por via orientiĝo liston de la plej gravaj ŝanĝoj.

1. La statutprojekto distingas inter celoj kaj rimedoj, limigante la efektivajn celojn de la Asocio al nur du, kaj mallongigante la liston de rimedoj uzataj por atingi tiujn celojn. La ŝanĝoj simpligas kaj pliklarigas la malnovan tekston.

2. La projekto klarigas, ke UEA estas neŭtrala pri ĉiuj demandoj escepte de lingvaj problemoj. La nuna Statuto ne aludas al lingvaj problemoj en sia paragrafo pri neŭtraleco.

3. La projekto rekonas, ke ankaŭ la parolata lingvo estas elemento en la lingva fenomeno Esperanto, aldonante al la paragrafo pri la oficiala lingvo de la Asocio tiusencan frazeron.

4. La projekto postulas, ke landa asocio aliĝinta al UEA devas "respekti la Statuton de UEA, precipe

ĝiajn celojn kaj ĝian neŭtralecon." La malnova Statuto postulas, ke landaj asocioj estu same neŭtralaj kiel la centra UEA mem.

5. La projekto malfermas la eblecon, ke UEA faru kontraktojn kun landaj asocioj kaj neesperantaj asocioj, kiuj aŭ ne deziras aliĝi al la Asocio aŭ ne plenumas la kondiĉojn. Tio vastigas la procedon jam aplikatan ĉe fakaj asocioj, per enpreno de tiuj du aliaj kategorioj de asocioj.

6. La projekto starigas procedon por ebligi elekton de komitatanoj B fare de ĉiuj individuaj membroj, kaj ne nur de la delegitoj. Tiu procedo en la praktiko ne ŝanĝus la proporciojn de la tri kategorioj de komitatanoj en la nuna Komitato.

7. La projekto modifas la postulojn koncerne la nombron de membroj de landa asocio bezonatan por elekti komitatanon A. Tiu modifo tamen konservus la nunan efektivan konsiston de la Komitato.

8. Laŭ la projekto, aliĝinta faka asocio povus elekti observanton en la Komitato, se ĝi ne havus la minimuman membronombro bezonatan por nomi plenrajtan komitatanon. Komitatano A, reprezentanta fakan asocion, rajtus nomi anstataŭanton. Ambaŭ reformoj donus al fakaj asocioj rajtojn jam posedatajn de landaj asocioj.

9. La projekto eksplicite nomas TEJO-n kiel junularan sektion de UEA kaj certigas al ĝi reprezentigon en la Komitato.



Ne plu sur herbejo: La projekto de la nova Statuto antaŭvidas klaran lokon de TEJO en la strukturo de UEA.

10. La projekto limigas la deĵorperiodon de la prezidanto kaj lasas pli da fleksebleco en la disdivido de la taskoj en la Estraro.

11. La projekto modifas la kondiĉojn por la ĝenerala voĉdono kaj fortigas la voĉon de la individuaj membroj en tiu procedo.

12. La projekto forigas la kategorion de "Apogantoj", kiu en la praktiko montriĝis nestarigebla en tiu formo. Tio neniel malhelpas, ke en la estonteco la Komitato restarigu ĝin en alia formo per la Ĝenerala Regularo.

Humphrey Tonkin

Statuto kaj statutprojekto

Sur la sekvantaj ses paĝoj aperas la tekstoj de la nuna Statuto de UEA kaj de la projekto de nova statuto ellaborita de d-ro Tonkin. Necesas bone kompreni, ke tiu projekto neniel estas oficiala statutpropono de iu el la organoj de la Asocio. Ĝi aperas ĉi tie nur kiel bazo por plua diskuto kondukanta al nova projekto, kiun siatempe povus oficialigi la Komitato kaj submeti al la ĝenerala voĉdono de la membraro de UEA. Por faciligi la komparon de la valida Statuto (maldekstra kolumno) kun la projekto de d-ro Tonkin (dekstra kolumno) ni klopodis — kie tio eblis — apudmeti la statutajn artikolojn laŭteme. Steleto indikas signifan modifon en la projekto, kompare kun la koncerna artikolo en la valida Statuto.

Nun valida Statuto

I. ĜENERALAJ PRINCIPOJ

1. **Titolo.** La nomo de la asocio estas: Universala Esperanto-Asocio (UEA). La Universala Esperanto-Asocio (fondita la 28an de aprilo 1908) kaj Internacia Esperanto-Ligo (fondita 1936) kunfandiĝis en unu organizaĵon kun la nomo Universala Esperanto-Asocio je la 28a de aprilo 1947.

La Universala Esperanto-Asocio estas fondita por la daŭro de periodo de 29 jaroj, kalkulita de la 28-a de aprilo 1947 kaj sekve finiĝonta je la 27-a de aprilo 1976.

2. **Konsisto.** La Asocio konsistas el Esperantistaj organizaĵoj kaj individuaj personoj.

3. **Celoj.** Ĝiaj celoj estas:—

a. disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;
b. plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo;

Ĝi provas atingi tiujn ĉi celojn per jenaj agadoj:

(i) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj;

(ii) zorgi pri la kunagado de Esperantistaj organizaĵoj;

(iii) krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio;

(iv) okazigi la Universalajn Esperanto-Kongresojn kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn;

(v) apliki aliajn jure permesitajn rimedojn, kiuj alproksimigas la celojn de la Asocio.

Por la plenumo de siaj celoj la Asocio rajtas akcepti aŭ akiri proprajn kaj povas elekti kuratorojn por daŭre posedi tiujn laŭ kondiĉoj difinitaj de la Komitato.

4. **Neŭtraleco.** UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj.

UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Ĝia sinteno estas diktata de la ideaj celoj de la Esperanto-movado. Ĝi rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur ne-politika bazo klopodas efektiviĝi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio.

5. **Lingvo.** La oficiala lingvo de UEA estas la Zamenhofa lingvo Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per sia fundamento kaj per sia verkaro.

6. **La Sidejo.** La ĉefsidejo de la Asocio estas en Rotterdam, Nederlando. La Sidejo de la Serva Centro estas en Svislando. La Komitato povas per 2/3 de la voĉoj de ĉiuj komitatanoj ŝanĝi la landojn kaj lokojn de la ĉefsidejo kaj de la Serva Centro. La Estraro rajtas funkciigi aliajn oficejojn laŭbezone.

7. **Administra jaro.** La administra jaro estas la kalendara jaro.

Nova statutprojekto

A. ĜENERALAJ PRINCIPOJ

1. **Titolo kaj Daŭro.** La nomo de la Asocio estas: Universala Esperanto-Asocio, en sekvantaj artikoloj de tiu ĉi statuto kaj en la regularoj nomata UEA. UEA (fondita la 28an de aprilo 1908) kaj Internacia Esperanto-Ligo (fondita en 1936) kunfandiĝis en unu organizaĵon kun la nomo Universala Esperanto-Asocio je la 28a de aprilo 1947. UEA estis fondita por la daŭro de periodo de 29 jaroj, kiu finiĝis la 27an de aprilo 1976. La jura ekzisto de UEA estis plilongigita por nova periodo de 29 jaroj, ĝis la 27a de aprilo 2005. UEA, ekde la validiĝo de tiu ĉi statuto, estas fondita por senlima periodo.

2. **Konsisto.** La Asocio konsistas el Esperanto-organizaĵoj kaj individuaj personoj.

* 3. **Celoj.** La celoj de UEA estas:

(a) labori por la solvo de la monda lingvo-problemo kaj faciligi la internacian komunikadon pere de la Internacia Lingvo Esperanto;

(b) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo.

* 4. **Rimedo.** La Asocio laboras por atingi tiun celon per, interalie, kunordigo de la diversaj Esperanto-asocioj, publikigo de libroj kaj aliaj eldonaĵoj, informa agado, servoj al la parolantoj de Esperanto, okazigo de kongresoj kaj konferencoj, kaj kunlaboro kun aliaj similcelaj asocioj.

* 5. **Neŭtraleco.** UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, kaj tiuj sociaj kaj politikaj problemoj, kiuj ne estas lingvaj problemoj. Tiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj. Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj estas por la laboro de UEA esenca kondiĉo.

6. **Lingvo.** La oficiala lingvo de UEA estas la Zamenhofa lingvo Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per sia fundamento, sia verkaro, kaj la ĝenerala ĝusta lingvo-uzo.

7. **Sidejo.** La ĉefsidejo de UEA estas en Rotterdam, Nederlando. La Estraro rajtas funkciigi aliajn oficejojn laŭbezone.

8. **Administra jaro.** La administra jaro estas la kalendara jaro.

8. **Ofic-daŭro.** Ĉiuj oficoj daŭras tri jarojn; la ofico-havantoj estas reelekteblaj. La organoj, kiuj laŭ la statuto elektas la oficohavantojn, povas al ili esprimi sian malkonfidon pli frue kaj je ilia loko elekti aliajn.

9. **Respondeco.** Pri la agoj de siaj reprezentantoj kaj oficistoj la Asocio estas nur tiom respondeca, kiom tiuj agoj okazis laŭ la kompetenteco kiun por ĉiu ofico difinas la statuto aŭ la regularoj.

La Asocio malakceptas ĉiun financon respondecon pri la funkciado de la servoj.

Tiu ĉi statuto kaj la regularoj estas devigaj por ĉiuj aliĝintaj organizaĵoj kaj membroj.

II. MEMBRECO

10. **Membro-kategorioj.** La Asocio distingas en sia administrado jenajn membrojn:

(a) Asociaj Membroj (AM); ili estas membroj, are aligitaj de la aliĝintaj asocioj.

(b) Individuaj Membroj; ili estas personoj, individue enlistigitaj de UEA.

(c) Honoraj Prezidantoj kaj Honoraj Membroj; ili estas membroj, nomitaj laŭ aparta regularo, surbaze de siaj meritoj por la Asocio aŭ por la Esperanto-Movado.

(ĉ) Membroj de la Honora Patrona Komitato; ili estas membroj, nomitaj laŭ aparta regularo, surbaze de siaj sciencaj meritoj por la Esperanto-Movado.

11. **Akcepto de Asociaj kaj de Individuaj Membroj.** La akcepto de Asociaj Membroj okazas pere de la Aliĝintaj Asocioj. Kiel Individua Membro povas esti akceptita ĉiu honorinda persono. Neplenaĝuloj, kiuj deziras membriĝi, bezonas skriban konsenton de siaj gepatroj aŭ prizorgantoj. La aliĝo, kondiĉoj por akcepto kaj eksigo estas fiksataj en la Ĝenerala Regularo.

12. **Apogantoj de UEA** estas personoj, kiuj apogas la celojn de la Asocio, kaj kiuj estas akceptitaj laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo. La Apogantoj havas neniajn rajtojn en la Asocio.

III. LANDAJ ASOCIOJ

13. **Aliĝkondiĉoj.** Ĉiu Landa Asocio Esperantista povas aliĝi al UEA, se ĝi havas la nombron da membroj fiksitan en la Ĝenerala Regularo, se ĝi estas laŭorde organizita kaj se vidiĝas klare el ĝia statuto, ke temas pri asocio neŭtrala laŭ la senco de par. 4. Principe UEA akceptas el unu regno nur unu landan asocion, sed la Komitato rajtas akcepti plurajn.

Landa Asocio pagas por ĉiuj siaj membroj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA, sumon difinitan en la Ĝenerala Regularo.

IV. ALIAJ ORGANIZAĴOJ

14. **Aliĝkondiĉoj.** La internaciaj Esperantistaj Fakaj Asocioj neŭtralaj povas aliĝi al UEA laŭ la kondiĉoj fiksataj en la Ĝenerala Regularo.

15. **Kontraktoj kun Fakaj Asocioj.** Kun internacia Esperantista Faka Asocio neŭtrala la Asocio povas fari kontrakton pri komuna agado, interŝanĝo de servoj k.t.p. La Estraro estas rajtigita fari kun ĝi kontrakton pri speciala kotizo aŭ pri aliĝo de ĝiaj membroj kiel asociaj aŭ individuaj membroj de UEA.

La Komitato aprobas aŭ malaprobas la kontraktojn kun la Fakaj Asocioj.

16. **Kontraktoj kun neneŭtralaj asocioj.** La Asocio rajtas fari kontraktojn pri kunlaboro kaj interŝanĝo de servoj k.t.p. kun internaciaj neneŭtralaj Esperantistaj asocioj, kondiĉe ke tiuj rilatoj ne estu en kontraŭeco kun la principo de par. 4.

17. **Kontraktoj kun landaj fakaj asocioj.** La Asocio povas fari kontraktojn laŭ la samaj kondiĉoj kun landaj Fakaj Asocioj Esperantistaj post la aprobo de la koncerna Landa Asocio, se ĉi tiu aliĝis al UEA.

* 9. **Daŭro de Oficoj.** Ĉiuj oficoj, kun escepto de salajrataj, daŭras maksimume tri jarojn. La oficohavantoj estas reelekteblaj laŭ la kondiĉoj fiksataj en la Statuto kaj Ĝenerala Regularo. La organoj, kiuj laŭ la Statuto elektas la oficohavantojn, rajtas esprimi al ili malkonfidon pli frue kaj elekti aliajn je ilia loko.

10. **Respondeco.** Pri la agoj de siaj reprezentantoj kaj oficistoj la Asocio estas respondeca nur tiom, kiom tiuj agoj okazis en la kompetenteco, kiun por ĉiu ofico difinas la statuto aŭ la regularoj.

B. MEMBRECO

11. **Membro-kategorioj.** La Asocio konsistas el:

(a) Aligitaj Membroj (AM), are aligitaj de la aliĝintaj asocioj;

(b) Individuaj Membroj, individue enlistigitaj de UEA;

(c) Honoraj Prezidantoj kaj Honoraj Membroj, laŭ kategorioj difinitaj en la regularoj de la Asocio;

12. **Akcepto de Aligitaj kaj de Individuaj Membroj.** La akcepto de Aligitaj Membroj okazas pere de la Aliĝintaj Asocioj. Aliajn kondiĉojn de aliĝo, membreco kaj eksigo fiksas la Ĝenerala Regularo kaj aliaj regularoj.

C. LANDAJ ASOCIOJ

13. **Aliĝkondiĉoj.** Ĉiu landa Esperanto-asocio rajtas aliĝi al UEA, se ĝi plenumas la kondiĉojn priskribitajn en la Ĝenerala Regularo, se ĝi estas vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, kaj se ĝi skribe konfirmas sian pretecon respekti la statuton de UEA, precipe ĝiajn celojn kaj ĝian neŭtralecon. Landa Asocio pagas por ĉiuj siaj membroj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA, sumon difinitan de la Komitato.

Ĉ. FAKAJ ASOCIOJ

14. **Aliĝkondiĉoj.** Internaciaj fakaj Esperanto-asocioj neŭtralaj rajtas aliĝi al UEA laŭ la kondiĉoj fiksataj en la Ĝenerala Regularo.

D KUNLABORO KUN ALIAJ ASOCIOJ

15. **Esperanto-asocioj.** Kun landaj aŭ fakaj asocioj, kiuj ne plenumas la kondiĉojn priskribitajn en par. 13 kaj 14, aŭ kiuj ne deziras formale aliĝi al UEA, la Estraro rajtas fari kontraktojn pri komuna agado, interŝanĝo de servoj, ktp. La Komitato devas aprobi aŭ malaprobi tiajn kontraktojn, kaj rajtas starigi specifajn kondiĉojn per apartaj regularoj.

18. **Apogantaj Organizaĵoj.** Ne-Esperantistaj organizaĵoj, kiuj deziras montri sian simpatian al la Esperanto-movado, povas kiel Apogantaj Organizaĵoj esti akceptitaj de la Estraro laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo.

V. EKSIGO KAJ EKSIGO

19. **Eksigo.** Membro aŭ organizaĵo, kiu dum la kuranta jaro, malgraŭ averto, ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksiginta.

20. **Eksigo.** Membro aŭ organizaĵo, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de UEA, aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al UEA, povas esti eksigita de la Asocio. La Estraro estas kompetenta pri la eksigo de la individuaj membroj kaj la Komitato pri la eksigo de organizaĵoj aŭ Komitatanoj de UEA, post esploro laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo.

VI. ĈEFDELEGITOJ, PERANTOJ KAJ DELEGITOJ

21. Por reprezenti la Asocion en la diversaj landoj oni nomas Ĉefdelegiton aŭ Peranton.

En ĉiuj lokoj UEA povas esti reprezentata de Delegito, Vic-delegitoj, Fak-delegitoj aŭ aliaj Delegitoj.

22. La Delegito varbas membrojn kaj funkciigas la servojn laŭ la kondiĉoj difinitaj en la Ĝenerala Regularo. La delegiteco estas sensalajra ofico.

23. **Elektito.** La kondiĉoj por la nomigo kaj eksigo de la funkciuloj, menciitaj en la par. 21, estas fiksitaj en la Ĝenerala Regularo.

VII. KOMITATO

24. **Konsisto.** La gvidado de la Asocio estas konfidata al la Komitato de UEA.

Ĝi estas elektata ĉiun trian jaron kaj konsistas el: Komitatanoj A, elektitaj de la aliĝintaj asocioj; Komitatanoj B, elektitaj de la Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj; Komitatanoj C, al-elektitaj de la Komitatanoj A kaj B.

25. **Elektito.** (A) Ĉiu Aliĝinta Landa Asocio kun 150 ĝis 1,000 membroj elektas unu Komitatanon kaj unu plian por ĉiu komencita milo. La nombro de la Komitatanoj de ĉiu asocio restas sen ŝanĝo dum la oficperiodo, sed asocio, kiu aliĝas aŭ atingas pluan milon, elektas Komitatanon aŭ Komitatanojn por la resto de la periodo. Eksigintaj kaj mortintaj Komitatanoj povas esti anstataŭataj. Por la membronombro validas la ciferoj je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro.

Ĉiu aliĝinta Faka Asocio (par. 14) elektas unu Komitatanon A. Se estas pli ol 5 aliĝintaj Fakaj Asocioj, ili elektas inter si 5 Komitatanojn.

Se la nombro de la Komitatanoj A superas 40 personojn la Komitato rajtas plialtigi la supre fiksitajn elekto-ciferojn.

Aliĝinta Landa Asocio havanta malpli ol 150 membrojn, rajtas elekti unu observanton al la Komitato. La observanto ricevas ĉiujn dokumentojn de la Komitatanoj kaj rajtas ĉeesti la Komitatkunsidojn, sed ne havas voĉdonrajton.

(B) La Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj elektas el internacia listo, pretigita laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo, unu Komitatanon por 250 Delegitoj. La Vicdelegitoj kaj Fakdelegitoj ne partoprenas tiun ĉi voĉdonon.

(C) Por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj la Komitatanoj A kaj B povas kompletigi la Komitaton, elektante pliajn Komitatanojn per sekreta voĉdono ĝis la kvarono de sia propra nombro.

Salajrata oficisto de UEA ne povas esti Komitatano. Ĉiuj Komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj. Tamen ne estas reelektebla Eŭropa Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun Komitatkunsidon dum la du lastaj oficperiodoj.

Komitatano devas esti Membro-Abonanto de UEA.

16. **Asocioj Neesperantaj.** La Asocio rajtas fari kontraktojn, laŭ la samaj kondiĉoj, kun neesperantaj organizaĵoj.

E. EKSIGO KAJ EKSIGO

17. **Eksigo.** Membro aŭ organizaĵo, kiu dum la kuranta jaro, malgraŭ averto, ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksiginta.

18. **Eksigo.** Membro aŭ organizaĵo, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de UEA, aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al UEA, povas esti eksigita de la Asocio. La Estraro estas unuavice kompetenta pri la eksigo de la individuaj membroj, kaj la Komitato pri la eksigo de organizaĵoj aŭ Komitatanoj de UEA, post esploro laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo. Individuaj membroj eksigitaj de la Estraro rajtas postuli decidon de la Komitato.

F. ĈEFDELEGITOJ, PERANTOJ KAJ DELEGITOJ

19. **Ĉefdelegitoj kaj Perantoj.** Por reprezenti la Asocion en la diversaj landoj la Estraro nomas po unu ĉefdelegiton kaj/aŭ peranton.

20. **Delegitoj.** La Delegita Reto konsistas el Delegitoj, Vic-delegitoj, Fak-delegitoj, Junularaj Delegitoj, kaj eventuale aliaj kategorioj. La elektoprocedon, funkciojn kaj kondiĉojn de delegiteco fiksas aparta regularo.

G. KOMITATO

* 21. **Konsisto.** La gvidado de la Asocio estas konfidata al la Komitato de UEA. Ĝi estas elektata ĉiun trian jaron kaj konsistas el:

- (a) Komitatanoj A, elektitaj de la aliĝintaj asocioj;
- (b) Komitatanoj B, elektitaj de la individuaj membroj;
- (c) Komitatanoj C, elektitaj de la Komitatanoj A kaj B.

* 22. **Komitatanoj A.** Ĉiu aliĝinta landa asocio kun 100 ĝis 1000 membroj elektas unu Komitatanon kaj unu plian por ĉiu komencita milo ĝis maksimumo de kvin komitatanoj. Pliajn komitatanojn super tiu nombro ĝi elektas por ĉiu komencita kvinmilo. Neniu landa asocio rajtas al pli ol ok komitatanoj entute. La nombro de la Komitatanoj de ĉiu asocio restas sen ŝanĝo dum la oficperiodo, sed asocio, kiu aliĝas aŭ atingas pluan milon (ĝis maksimumo de 4000) aŭ kvinmilon (super tiu nombro, sed nur ĝis la maksimumo), elektas Komitatanon aŭ Komitatanojn por la resto de la periodo. La landa asocio rajtas elekti novan Komitatanon se la antaŭa mortis aŭ eksigis. Por la membronombro validas la ciferoj je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro.

Ĉiu aliĝinta faka asocio elektas unu Komitatanon A, kondiĉe, ke ĝi havas minimume cent membrojn. Validas la ciferoj je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro.

* 23. **Komitatanoj B.** La Individuaj Membroj, en ĉiuj eventualaj kategorioj, elektas el internacia listo, pretigita laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo, unu Komitatanon por ĉiu komencita milo da Individuaj Membroj, laŭ la ciferoj je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro kaj ĝis maksimumo de unu duono de la nombro da Komitatanoj A je tiu sama dato.

24. **Komitatanoj C.** Por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj la Komitatanoj A kaj B rajtas kompletigi la Komitaton, elektante pliajn Komitatanojn per sekreta voĉdono ĝis la kvarono de sia propra nombro.

25. **Kondiĉoj de Komitataneco.** Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti Komitatano. Ne estas reelektebla Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun Komitatkunsidon dum la du lastaj oficperiodoj. Komitatano devas esti Individua Membro de UEA. Ĉiuj Komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj.

26. **Anstataŭantoj.** Komitatano elektita de Landa Asocio (grupo A), kiu ne povas partopreni Komitatkunsidon, devas nomi anstataŭanton, skribe aprobotan de la koncerna Asocio. Tiu anstataŭanto havas dum la koncerna kunsido la samajn rajtojn kiel ĉiu alia Komitatano.

27. **Rolo.** La Komitato

elektas inter siaj membroj Prezidanton, unu aŭ du Vic-prezidantojn, Ĝeneralan Sekretarion kaj du ĝis kvar pliajn membrojn de la Estraro;

rajtas nomi Honoran Prezidanton, Honorajn Membrojn kaj Membrojn de la Honora Patrona Komitato;

difinas la ĝeneralan agadon de UEA;

decidas pri aliĝo de Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj pri kontraktoj kun Fakaj Asocioj;

decidas pri la Regularoj;

aprobas la buĝeton kaj ekzamenas la financojn de la Asocio;

decidas pri la agado de la Estraro;

decidas pri la aferoj ne rezervitaj al aliaj instancoj.

VIII. ESTRARO

28. **Konsisto.** La Estraro de UEA konsistas el la Prezidanto, unu aŭ du Vic-Prezidantoj, la Ĝenerala Sekretario kaj el du ĝis kvar pliaj Estraranoj. La anoj de la Estraro loĝu prefere en landoj ne tro malproksimaj de la Asocia sidejo kaj deklaru sin pretaj partopreni la kunsidojn de la Estraro kaj de la Komitato.

29. **Rolo.** La Estraro, kiu estas respondeca al la Komitato: elektas la Redaktoron de la Revuo *Esperanto*,

nomas kaj maldungas la Direktoron de la Centra Oficejo (CO) kaj la Direktorojn aŭ Administrantojn de eventuale aliaj oficejoj,

okazigas la Universalajn kaj aliajn Kongresojn kaj Konferencojn,

kreas novajn servojn kaj aranĝojn,

prezentas al la Komitato proponon pri la buĝeto kaj respondecas pri la financoj de UEA,

plenumas la decidojn de la Komitato.

30. **Funkcioj.** La Prezidanto de UEA reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Komitaton, la Estraron kaj la Kongresojn de UEA. Li kontrolas aŭ kontroligas minimume unu fojon ĉiujare la oficejojn. Li rajtas delegi alian Komitatanon por difinita tasko. En esceptaj okazoj li havas la povon de la Estraro aŭ de la Komitato, al kiuj li raportu kiel eble plej baldaŭ por aprobo.

La Vicprezidantoj laŭnecese anstataŭas la Prezidanton.

La Ĝenerala Sekretario zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Komitato kaj Estraro; kunmetas la jaran raporton pri la laboro de la Asocio kaj ellaboras la planon de la laboro por la estonta jaro; prizorgas la mondan informadon pri Esperanto; gvidas la eksterajn rilatojn de la Asocio; plenumas aliajn taskojn, kiujn la Komitato aŭ la Estraro donas al li. La Ĝenerala Sekretario povas ricevi kompenson, fiksitan de la Komitato.

* 26. **Observantoj.** Aliĝinta landa aŭ faka asocio havanta malpli ol 100 membrojn rajtas elekti unu observanton al la Komitato. La observanto havas ĉiujn rajtojn kaj devojn de la Komitatanoj escepte de la voĉdonrajto.

27. **Anstataŭantoj.** Komitatano A, kiu ne povas partopreni Komitatkunsidon, devas nomi anstataŭanton, skribe aprobotan de la koncerna Asocio. Tiu anstataŭanto havas dum la koncerna kunsido la samajn rajtojn kiel ĉiu alia Komitatano. Anstataŭanto devas esti Individua Membro de la Asocio.

28. **Rolo.** La Komitato

(a) elektas inter siaj membroj Prezidanton, unu aŭ du Vic-prezidantojn, Ĝeneralan Sekretarion kaj du ĝis kvar pliajn membrojn de la Estraro;

(b) rajtas nomi Honorajn Prezidantojn, Honorajn Membrojn kaj Membrojn de la Honora Patrona Komitato;

(c) difinas la ĝeneralan agadon de UEA;

(ĉ) decidas pri aliĝo de Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj pri kontraktoj kun kunlaborantaj asocioj (v. para. 15 k 16);

(d) decidas pri la regularoj;

(e) aprobas la buĝeton kaj ekzamenas la financojn de la Asocio;

(f) decidas pri la agado de la Estraro;

(g) decidas pri la aferoj ne rezervitaj al aliaj instancoj.

Ĝ. JUNULARA SEKCIO

* 29. **Nomo kaj Regularo.** La junulara sekcio de UEA estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ĝi estas integra parto de UEA. Ĝian agadon kaj internan organiziĝon difinas aparta regularo.

* 30. **Reprezentigo.** Membroj de TEJO, kiuj estas Individuaj Membroj de UEA, rajtas kandidatiĝi por ĉiu ajn ofico en la Asocio, sed, por certigi la reprezentiĝon de TEJO en la Komitato de UEA, TEJO estas traktata kiel faka asocio, laŭ la senco de para. 22.

H. ESTRARO

31. **Konsisto.** La Estraro konsistas el la personoj menciitaj en par. 28(a). Ĉiu kandidato por estraraneco devas deklari sin preta partopreni la kunsidojn de la Estraro kaj de la Komitato.

32. **Rolo.** La Estraro estas respondeca al la Komitato. Ĝi

(a) respondecas, sub gvido de la Komitato, pri la ĝenerala evoluigo de la Asocio;

(b) plenumas la decidojn de la Komitato;

(c) prezentas al la Komitato proponon pri la buĝeto kaj respondecas pri la financoj de UEA;

(ĉ) prezentas al la Komitato jarraporton pri la agado;

(d) informadas la komitatanojn de tempo al tempo pri la evoluo de la laboro;

(e) nomas la direktoron de la Centra Oficejo (CO) kaj la direktorojn aŭ gvidantojn de eventuale aliaj oficejoj;

(f) elektas la Redaktoron de la Revuo *Esperanto*;

(g) okazigas la Universalajn Kongresojn.

* 33. **Prezidanto.** La Prezidanto reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Estraron kaj la Universalajn Kongresojn. Li rajtas delegi alian Komitatanon por difinita tasko. Prezidanto rajtas ofici dum maksimume du deĵorperiodoj sinsekve. Je tiu punkto li devas retiriĝi el la prezidanta kandidateco dum almenaŭ unu deĵorperiodo.

34. **Vicprezidantoj.** La Vicprezidantoj laŭnecese anstataŭas la Prezidanton.

35. **Ĝenerala Sekretario.** La Ĝenerala Sekretario zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Komitato kaj Estraro kaj respondecas pri la kontaktoj kun la Komitato.

La ceteraj Estraranoj plenumas laŭbezone komisiitajn taskojn.

IX. LABORMANIERO

31. **Kunsidoj.** La Komitato kunvenas okaze de la Universala Kongreso; krom tio la Estraro kunvenas almenaŭ unufoje ĉiujare en la Centra Oficejo.

32. **Voĉdonado.** En voĉdonadoj validas la plimulto de la voĉdonintoj; okaze de voĉegaleco decidas la Prezidanto. Decidoj, kiujn partoprenis malpli ol duono de la Komitato aŭ de la Estraro, devas poste esti submetataj al skriba voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonintoj. Komitatano sin detenas de voĉdono pri aferoj, kiuj koncernas lin persone.

33. **Komisioj.** Por esplori iujn problemojn, aŭ por la plenumo de difinitaj administraj taskoj, la Komitato aŭ la Estraro povas elekti inter aŭ ekster si reprezentanton aŭ specialajn komisionojn kun kontrolpovoj, sed ne rajtas transdoni al ili siajn povojn.

34. **Kompenso.** Por kovri la administrajn kaj vojaĝajn elspezojn de la Estraranoj la Komitato asignas certan sumon en la Buĝeto. La Komitato povas asigni al Komitatano kompencon por speciala tasko, kies plenumo postulas grandan tempoperdon.

X. UNIVERSALA KONGRESO

35. **Celo.** La Universala Kongreso estas internacia manifestacio de la Esperantistaro. Ĝi celas fortigi la solidarecon inter Esperantistoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn. La oficiala lingvo estas Esperanto. La organizo de la Universalaj Kongresoj estas fiksita de la Komitato en la Kongresa Regularo.

XI. OFICEJOJ

36. **Centra Oficejo.** La Centra Oficejo (C.O.) de la Asocio estas gvidata de Direktoro. Liajn laborkondiĉojn kaj salajron fiksas la Estraro. Li estras la tutan teknikan-administran laboron de la Asocio kaj preparas la buĝeton. Li sciigas la Ĝeneralan Sekretarion pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj de la oficejo kaj submetas al la Estraro la aferojn bezonantajn ĝian aprobon. Iniciato de proceso apartenas al la Estraro. Dokumentoj, en kiuj UEA devigas sin al garantio, mendo aŭ pago je pli ol 500 gld. devas porti la subskribon de la Prezidanto aŭ de la Ĝenerala Sekretario, kaj de la Direktoro. Tio ne validas por la normala funkciado de la Oficejo.

La oficistoj de la Centra Oficejo estas nomataj de la Direktoro, kiu fiksas iliajn salajrojn laŭ la bezono kaj la oficeja kutimo. Li raportas al la Estraro por aprobo.

XII. REVUO, BIBLIOTEKO

37. **Revuo.** La oficiala organo de la Asocio estas *Esperanto*, fondita de H. Hodler. *Esperanto* estas redaktata en la spirito de la fundamenta principo de la Asocio (par. 4) kaj laŭ la ĝeneralaj gvidlinioj kiujn fiksas la Estraro.

38. **Biblioteko kaj Arkivo.** La Biblioteko de UEA portas la nomon "H. Hodler". Ĝi estas registrita en la listo de la specialigitaj bibliotekoj sub la titolo: Biblioteko de la Internacia Lingvo (Bibliothèque de la Langue Internationale).

XIII. FINANCOJ

39. **Administrado.** La Centra Oficejo administras ĉiujn monaferojn de la Asocio, kun escepto de la kapitaloj, kaj publikigas la jarbilancon.

40. **Reviziado.** Ĉiujare la librotenado kaj la agado de la oficejo devas esti ekzamenataj de minimume 2 Komitatanoj, kiuj raportas al la Estraro kaj la Komitato. La koncernaj Komitatanoj estas nomataj de la Komitato.

Ĥ. LABORMANIERO

36. **Kunsidoj.** La Komitato kunvenas okaze de la Universala Kongreso; krom tio la Estraro kunvenas almenaŭ unufoje ĉiujare en la Centra Oficejo.

37. **Voĉdonado.** En voĉdonadoj validas la plimulto de la voĉdonintoj; okaze de voĉegaleco decidas la Prezidanto. Decidoj, kiujn partoprenis malpli ol duono de la Komitato aŭ de la Estraro, devas poste esti submetataj al skriba voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonintoj. Komitatano sin detenas de voĉdono pri aferoj, kiuj koncernas lin persone.

38. **Komisioj.** Por esplori iujn problemojn, aŭ por la plenumo de difinitaj administraj taskoj, la Komitato aŭ la Estraro povas elekti inter aŭ ekster si reprezentanton aŭ specialajn komisionojn kun kontrolpovoj, sed ne rajtas transdoni al ili siajn povojn.

39. **Kompenso.** Por kovri la administrajn kaj vojaĝajn elspezojn de la Estraranoj la Komitato asignas certan sumon en la Buĝeto. La Komitato povas asigni al Komitatano kompencon por speciala tasko, kies plenumo postulas grandan tempoperdon.

I. UNIVERSALA KONGRESO

40. **Celo kaj Organizado.** La Universala Kongreso de Esperanto estas internacia manifestacio de la parolantoj de Esperanto. Ĝi celas fortigi ilian solidarecon, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn. La oficiala lingvo estas Esperanto. La Estraro decidas pri la loko kaj datoj de la Universalaj Kongresoj. Aparta Kongresa Regularo fiksas la administrajn kaj financajn kondiĉojn.

J. OFICEJOJ

41. **Centra Oficejo.** La Centra Oficejo (CO) de la Asocio estas gvidata de direktoro. Liajn laborkondiĉojn kaj salajron fiksas la Estraro. Li estras la tutan teknikan kaj administran laboron de la Asocio kaj preparas la buĝeton. Li sciigas la Ĝeneralan Sekretarion pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj de la oficejo kaj submetas al la Estraro la aferojn bezonantajn ĝian aprobon. Iniciato de proceso apartenas al la Estraro. Dokumentoj, en kiuj UEA devigas sin al garantio, mendo aŭ pago je pli ol difinita sumo devas porti la subskribon de la Prezidanto aŭ de la Ĝenerala Sekretario, kaj de la Direktoro. Tiun sumon difinas la Estraro. Tio ne validas por la normala funkciado de la Oficejo.

La oficistoj de la Centra Oficejo estas nomataj de la Direktoro, kiu fiksas iliajn salajrojn. Li raportas al la Estraro por aprobo.

Ĵ. REVUO, BIBLIOTEKO

42. **Revuo.** La oficiala organo de la Asocio estas *Esperanto*, fondita en 1905. *Esperanto* estas redaktata en la spirito de la fundamentaj principoj kaj celoj de la Asocio kaj laŭ la ĝeneralaj gvidlinioj, kiujn fiksas la Komitato kaj Estraro.

43. **Biblioteko.** La Biblioteko de UEA portas la nomon Hector Hodler. La biblioteko disponigas al la membraro de UEA kaj aliaj esplorantoj la ĉefajn verkojn en kaj pri la Internacia Lingvo.

K. FINANCOJ

44. **Administrado.** La Centra Oficejo administras ĉiujn monaferojn de la Asocio, kun escepto de la kapitaloj, kaj publikigas la jarbilancon.

45. **Reviziado.** Ĉiujare la librotenado kaj la agado de la oficejo devas esti ekzamenataj de minimume 2 Komitatanoj, kiuj raportas al la Estraro kaj la Komitato. La koncernaj Komitatanoj estas nomataj de la Komitato.

41. **Asocia kapitalo.** La kotizoj de Dumvivaj Membroj, donacoj superantaj sumon fiksan de la Komitato kaj sen specialaj celoj, heredaĵoj k.t.p. formas la Asocian Kapitalon. La Estraro decidas pri eventuala uzo kaj ebla investo de la mono; ĝi rajtas elekti specialan administranton.

XIV. ĜENERALA VOĈDONO

42. **Okazigo.** Ĝenerala Voĉdono okazas:

se la Komitato aŭ, okaze de urĝeco, la Estraro ĝin decidas; se aliĝintaj asocioj reprezentantaj kvaronon de la membraro ĝin postulas per sia subskribo, en tempolimo de tri monatoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta subskribo.

La Direktoro ĝin aranĝas plej malfrue du monatojn post ricevo de sufiĉa nombro da subskriboj. Je propono pri statutŝanĝo okazas voĉdono pri ĉiu aparta paragrafo.

Tiu voĉdonado povas nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la Statuton kaj dissolvi la Asocion; krome ĝi povas esprimi sin pri demandoj submetitaj de la Komitato.

43. **Kalkulo de voĉoj.** Ĉiu aliĝinta asocio havas nombron de voĉoj egalan al la nombro de siaj membroj.

Por voĉdonado validas la nombro de la membroj, por kiu la aliĝinta asocio pagis en la jaro antaŭ la voĉdonado. Por novaliĝinta asocio validas la nombro por kiu ĝi jam pagis, sed almenaŭ la minimuma nombro, kiu rajtigas al aliĝo.

En lando kie ne ekzistas aliĝinta landa asocio la membroj voĉdonas individue.

En voĉdono validas la plimulto de la voĉoj esprimitaj. Por ŝanĝi la Statuton, kun la escepto de la par. 6 rilate la sidejojn, aŭ dissolvi la Asocion necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentu minimume duonon de la membraro.

Ŝanĝo en la Statuto ekvalidas unu monaton post akiro de la aprobo fare de la nederlanda instanco pri jura personeco.

44. **Kontrolo.** La ĝenerala voĉdonado estas skriba, kaj la voĉoj estas kalkulataj 90 tagojn post la forsendo de la voĉdoniloj. La voĉdonilojn kontrolas tri membroj nomitaj de la Komitato. Tiuj membroj skribe certigas la korektecon de la procedo. Komitatanoj rajtas ĉeesti kaj subskribi.

XV. DISSOLVO

45. En okazo de dissolvo, kun observo de par. 1702 de la nederlanda Civila Kodo, la Komitato nomas komisionon, kiu

1. likvidas la kurantajn aferojn de la Asocio;

2. indikas la rimedojn por kovri eventualan deficiton aŭ donacas la restantajn havaĵojn al alia Esperanto-organizaĵo, kiun indikas la decido pri dissolvo.

46. **Asocia kapitalo.** La kotizoj de Dumvivaj Membroj, donacoj superantaj sumon fiksan de la Komitato kaj sen specialaj celoj, heredaĵoj k.t.p. formas la Asocian Kapitalon. La Estraro decidas pri eventuala uzo kaj ebla investo de la mono; ĝi rajtas elekti specialan administranton.

L. ĜENERALA VOĈDONO

* 47. **Okazigo.** Ĝenerala Voĉdono okazas:

(a) se la Komitato, aŭ, okaze de urĝo, la Estraro ĝin decidas;

(b) aŭ se aliĝintaj asocioj reprezentantaj minimume kvaronon de la Aligita Membraro ĝin postulas per sia subskribo, en tempolimo de tri monatoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta subskribo;

(c) aŭ se minimume kvarono de la Individuaj Membroj ĝin postulas, laŭ tiuj samaj kondiĉoj.

La Direktoro ĝin aranĝas plej malfrue du monatojn post ricevo de sufiĉa nombro da subskriboj.

Tiu voĉdonado povas nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la Statuton kaj dissolvi la Asocion; krome ĝi povas esprimi sin pri demandoj submetitaj de la Komitato.

* 48. **Kalkulo de Voĉoj.** Ĉiu aliĝinta asocio havas nombron da voĉoj egalan al la nombro de siaj aligitaj membroj. Ĉiu Individua Membro havas unu voĉon. Por voĉdonado validas la nombro de la membroj, por kiu la aliĝinta asocio pagis en la jaro antaŭ la voĉdonado. Por novaliĝinta asocio validas la nombro por kiu ĝi jam pagis.

En voĉdono validas la plimulto de la voĉoj esprimitaj. Por ŝanĝi la Statuton, kun la escepto de la par. 6 rilate la sidejon, aŭ dissolvi la Asocion necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentu minimume duonon de la membraro.

Ŝanĝo en la Statuto ekvalidas unu monaton post akiro de la aprobo fare de la nederlanda instanco pri jura personeco.

49. **Kontrolo.** La ĝenerala voĉdonado estas skriba, kaj la voĉoj estas kalkulataj 90 tagojn post la forsendo de la voĉdoniloj. La voĉdonilojn kontrolas tri membroj nomitaj de la Komitato. Tiuj membroj skribe certigas la korektecon de la procedo. Komitatanoj rajtas ĉeesti kaj subskribi.

M. DISSOLVO

50. En okazo de dissolvo, kun observo de par. 1702 de la nederlanda Civila Kodo, la Komitato nomas komisionon, kiu

(a) likvidas la kurantajn aferojn de la Asocio;

(b) indikas la rimedojn por kovri eventualan deficiton aŭ donacas la restantajn havaĵojn al alia Esperanto-organizaĵo, kiun indikas la decido pri dissolvo.

Nova statuto povas fariĝi kolektiva verko de la tuta membraro de UEA!

Tion celas la dek unuaj paĝoj de ĉi tiu revunumero. Ili estas invito al la tuta membraro de la Asocio partopreni la statutan diskuton kaj ankaŭ tiel influi la necesan modernigon de la baza dokumento de UEA. Ne hezitu skribi! Aranĝu pritrakton de la statutprojekto en via loka Esperanto-klubo! Zorgu, ke viaj reagoj atingu la Centran Oficejon ĝis la mezo aŭ plej malfrue ĝis la fino de januaro 1979!

Popolarspeca

Recenzas Alec Venture (Britio):

Gudrun de Johannes V. Jensen (1873-1950). El la dana trad. Gudrun R. Jensen. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1977. 136p. 20cm. ISBN 87 85020 966.

Ĉi tiu verko rakontas pri epizodoj en la vivo de juna kopenhaganino en la tridekaj jaroj de la nuna jarcento, rilate al ŝiaj familio, ludonanto, laboro, laborĉefo kaj junaĝa amiko, al kiu ŝi fine edziniĝis. Inter la neofte renkontataj proprajoj de la historio estas la detalaj teknikaj priskriboj pri aŭtomobiloj, aviadiloj kaj la inĝeniera metio ĝenerale. Aliflanke oni legas multajn priskribojn ankaŭ pri floroj, birdoj, vetero kaj sezonoj.

La rakonto estas interesa, sed foje iom neverŝajna. Mi dubas ĉu la verkinto, nobelpremiito en la jaro 1944, gajnis la premion pro ĉi tiu verko, kiu ne impresas kiel serioza literaturo, sed kiu estas de tre populara speco (jam sur la kovrilo oni vidas bildon de juna nudulino).

Mankas informo pri la eldondato de la originalo, sed la eldonistoj de la traduko sciigas, ke ĉi tiun oni "iniciatis" antaŭ preskaŭ dudek jaroj. La lingvaĵo de la traduko estas facile legebla, sed ne mankas kritikindaĵoj, inter kiuj estas menciendaj la plurfoja uzo de "tiom" anstataŭ "tiel", kie temas pri grado, ne pri kvanto, kaj la ofta ellaso de subjekta pronomo (ĝi, tio, ktp.) antaŭ la verbo "estis" en okazoj, kie oni devus esprimi la subjekton. Iujn legantojn eble povus ĝeni la relativa malgrandeco de la tipografio. Kelkloke la literlinioj estas neregulaj, ŝajne pro posta korektado de la tajpaĵo antaŭ la ofseta presado.

Mendu ĉe UEA: 10,50 (por Nederlando 10,92) gld., plus sendokostoj 10%.

Kombino de traduktalentoj

Recenzas Probal Daŝgupto (Nov-Jorko):

Epifanio aŭ **Kiel vi volas** de Ŝekspiro. El la angla trad. William Auld. Glasgow: Kardo, 1977. 71p. 20cm. ISBN 0 905149 02 5.

En ĉi tiu fest-etosa ŝekspiraĵo, Viola, nobela ŝiprompulino, ŝajnigas sin viro, trione por amuziĝo kaj cetere pro bontrovo. Ŝi baldaŭ trovas sin devanta klopodi inklinigi al la duko — al kiu ŝi mem dume enamiĝis — la koron de rivalino, Olivia. Olivia, kompreneble, enamiĝas al la virŝajna Viola, kaj alia amanto de Olivia do entreprenas fortimigi Violan per dueliminaco. La nodaron fine 'solvas malimplike' (laŭ trafega esprimo de Auld, p. 20) la alsceniĝo de Sebastiano, ĝemelo de

RECENZKONDIĈOJ EN ĈI TIU REVUO

La revuo "Esperanto" principe (t.e. laŭ sia bontrovo) aperigas recenzojn pri duope ricevitaj libroj kaj gramofondiskoj aŭ muzikkasetoj. Pri pli gravaj politikaj kaj religiaj verkoj aperas recenzoj neŭtralaj. Eldonaĵojn unuope ricevitajn ni nur mencias. Ni mem elektas la recenzantojn. Recenzoj nepetitaj ne aperas.

Viola kiu estis ŝiprompinta aliloke. Li akceptas la amon de Olivia (kiu volonte reorientas siajn sentojn), liberigante Violan por edziniĝo kun ŝia duko, kiu sen sia scio estis emiĝinta al tio.

Sed, kiel C.L. Barber en sia *Shakespeare's Festive Comedy* (Princeton University Press, Usono, 1959) klare montras, samgrade kiel aŭ pli ol la "oficiala" intrigo de *Epifanio* esprimas ĝian tonon la tuta, tre amuza apudintrigo pri certa polichumora servisto de Olivia, Malvoljo, al kiu amuziĝama flankrolulo parolas klasikan riproĉon: **Ĉu vi supozas, ke, ĉar vi estas virt-ema, ne plu estos kukoj kaj elo?**

La kalemburemo de Ŝekspiro faris ankaŭ ĉi tiun lian dramon malfacile traktebla por ordinara tradukanto, kia Auld ja ne estas. Auld do regalias nian kulturon per la konversacio **Ho, se mi nur estus kulturinta mian kapon! — Tiuokaze vi havus belan rikolton da haroj.**, per la duonklerulaĵo **kanumliantoj**, kaj per pli da aliaj bonaĵoj ol mi havas da cita spaco.

Problemetas, tamen, preseraroj kiel **skevi** (: sekvi, 20) kaj **dualo** (: duelo, 23); ilia ĉeesto povas igi leganton maltrafi la vortludon (7) **pranci** : **pranzi** (oni povas pensi tion preseraro) kaj la proponatajn novvortojn **vigili** (20) kaj **pajeno** (40) aldone al la PIV-aj **vigli** kaj **pagano**. Alispecaj problemetoj estas uzado de **vi** sur p. 46 anstataŭ la **ciado**, kiun antaŭvidis p. 39 (kaj kiun havas la originalo), kaj uzo de **jetata** (70) en ripeto de teksto, kies unua apero (32) havas anstataŭe **trudata**.

La fakto mem, ke oni entute povas vidi tiajn mikroskopaĵojn, atestas, ke la traduko kiel tuto estas nova sukceso de Auld. Eble li el ĉiuj ĝisnunaj tradukintoj en la Esperantan literaturon havas la plej bonan kombinon de skrupulatento kun tia larĝa aŭskulto, kia alirigas lin al la difuzaj sed ne malpli gravaj toneroj de la originalaj verkoj.

Mendu ĉe UEA: 9,00 (por Nederlando 9,36) gld., plus sendokostoj 10%.

Faka verko ducela

Recenzas Peter G. Forster (Malavio):

Sociopsikologio kaj grupodinamiko de la Esperantomovado de Tazio Carlevaro. La Chaux-de-Fonds, Kultura Centro Esperantista, 1977. 35p./30cm. Studoj 7. Jen tre utila aldono al la ĝis nun preskaŭ ne ekzistanta sociscienca fakliteraturo en Esperanto. D-ro Carlevaro

klarigas sian ĉelon jene: enkonduki la leganton al la problemoj de socipsikologio kaj de grupdinamiko, klarigante per ekzemploj prenitaj de la Esperanto-movado. D-ro Carlevaro pritraktas la tipojn de kolektivoj kaj enkondukas la leganton al la bazaj konceptoj de individua kaj homamasa psikologio. Li pli detale ekzamenas la internan strukturon, funkciadon kaj formiĝon de la grupoj. Ĝenerale, lia verko multon klarigas, kaj aparte utila estas la diskuto pri komunikado kaj lingvo. Ĉi tie la aŭtoro lerte kunigas la eltrovaĵojn de psikologio, sociologio, lingvistiko kaj medicino.

La verko verŝajne celas ne nur enkonduki la leganton al la akademiaj studobjektoj, sed ankaŭ helpi al esperantistoj pli bone koni la Movadon. La duan celon la verko ankaŭ bone atingas. D-ro Carlevaro prave indikas, ke la Esperanto-movado "signifas ion... por la individuoj kiuj membras ĝin, kvankam plej ofte ili nur malbone konscias pri tio". Pri tiu lasta temo li pli profunde analizas tion, kion oni jam scias sociologie pri la Esperanto-movado. Mi ĝenerale konsentas kun tiu analizo, krom pri unu afero. Rilate mian konkludon, ke internacia reputacio estas relative pli facile akirebla en

la Esperanto-movado, li argumentas, ke tiu diritaĵo estas vera por ĉiuj movadoj, ekzemple por vegetarismo. Sed tio malatentas la evidentan fakton, ke internacia komunikado estas multe pli facila en esperantistaj rondoj pro la manko de lingva baro. Ankaŭ en lia diskuto pri la historio kaj subkulturo de la Movado, mankas trakto pri la pozicio de Zamenhof. La iloj de analizo prezentitaj en la verko estus tre utilaj por klarigi tiun gravan fenomenon.

En la fino de la verko troviĝas fakterminaro: denove utila pro la manko de socisciencaj terminoj en Esperanto. Estas iom bedaŭrinde, ke verŝajne li verkis ĝin samtempe kun mia sociologia terminaro, uzita en la SUK-kursoj en Antverpeno en 1976 (baldaŭ eldoniĝonta), kaj ni ne interŝanĝis ideojn. Ekzemple, mi jam proponis **karismo** kaj **socializo** dum d-ro Carlevaro proponas **harismo** kaj **socialigo**. Restos al la estonteco por decidi, ĉu necesas **komportemento** apud **konduto**, kaj **lidero** aldone al **ĉefo**. Sed ĝenerale ĉi tiu verko estas tre utila kontribuaĵo al nia fakliteraturo.

Mendu ĉe UEA: 6,00 (por Nederlando 6,24) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Brand (1866), Henrik Ibsen (1828-1906). El la norvega trad. Erling Anker Haugen. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 320p. Ilus. de la tradukinto. 21cm. Bel-literatura Eldon-serio 33. Serio Oriento-Okcidento n-ro 13. ISBN 90 6336 004 5. Versa dramo, laŭ iuj la vera majstroverko de Ibsen, pri kuraĝa, sinofera sed senkompata pastro. Kun ampleksa postparolo de K. Kalocsay. Prezo: 21,00 gld.

Enkonduko al ekumenaj problemoj, Władisław Miziołek. El la pola trad. Bolesław Monkiewicz. Romo: IKUE-Centro, 1978. 77p. 21cm. IKUE 6. Prezo: 7,80 gld.

Esperanta meslibreto. Romo: IKUE-Centro, 1978. 16p. 13cm. Prezo: 1,80 gld.

Esperanto derneği yayınları. İstanbul: Çukurova Matbaacılık Koll. Şti, 1976. 55p. 16cm. Prezo: 1,20 gld.

Esperanto sen antaŭjuĝoj, Walter Francini. Rio de Janeiro/ São João: Kultura Kooperativo de Esperantistoj/ San-Paŭlo Esperanto-Asocio, 1978. 208p. 21cm. Analizo de la ĉefaj kritikoj kontraŭ la Internacia Lingvo. Vd. ankaŭ "Esperanto sem preconceitos" ĉe *lernolibroj portugaliaj*. Prezo: 12,90 gld.

Eŭropa kalendaro 1979. Redaktis kaj ilustris Brigitte Frank-Böhringer. Paderborn: Eŭropa Klubo, 1978. 30cm. Naŭlingva kalendaro, uzebla kiel informilo (lernilo) pri Esperanto. Prezo: 12,00 gld.

Fronte al la vivo. J. Krishnamurti. El la angla trad. Kribo. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1979 (fakte 1978). 39p. Mimeo. 21cm. LJP-broŝuro 131B. Prezo 1,80 gld.

Homo en lageto, Janis Ezerins (1891-1924). El la latva trad. Ansis Atkalns. Tacoma: la tradukinto, 1977. 8p. 22cm. Novelo pri blindiĝanta avarulo. Prezo: 1,20 gld.

Japana variacio. Red. Masao Miyamoto (1913 -) kaj Masao Ueyama (1910 -). Kioto: L' Omnibuso, 1978. 139p. 19cm. Laŭintence daŭrigo de *Japana kvodlibeto* (1965), kun reprezenta elekto de poste aperintaj noveloj, poemoj kaj eseoj verkitaj en Esperanto de japanoj. Prezo: 16,80 gld.

Kial ne?; Festa numero. Red. Jano (Ian Carter). Londono: Junularo Esperantista Brita, 1978. 99p. Ilus. 21cm. Duone represajoj el la lasta periodo (1973-6) de la organo de la brita TEJO-sekcio, duone nova sed similspeca materialo: artikoloj, kantoj, poemoj, enigmoj, humuraĵoj. Kun la kompleta bildstria rakonto "La aventuroj de Superzam". Prezo: 5,10 gld.

Komuna kantareto de LJP. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1978. 26p. Mimeo. 21cm. LJP-broŝuro 122A. 25 kantoj popularaj en SAT-rondoj. Sen muziknotoj. Prezo: 0,90 gld.

Laŭ e...fika maniero, Fikspronulo (ps.). La SeksumKliniko, 1977. 2 vol. Entute 96p. 17cm. Vulgara kolekto de maldecaĵoj, kun simila "faka" vortareto. Prezo: (ambaŭ volumetoj kune): 9,00 gld.

Monda krizo de vidpunkto religia (1974), Horst Bruckner. El la angla trad. Arnold J. Leather. Gloucester: Kvakera Esperantista Societo, 1978. 10p. 15cm. Lampiro 3. Prezo: 1,20 gld.

Nova praktika vortaro hebrea-esperanta, Josef Murjan. Tel-Aviv, 1977. 162p. 13cm. Unudirekta. Prezo: 7,50 gld.

Parabolo pri la cisterno, La, Eduardo Bellamy (1850-1898). El la angla. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1978. 22p. Mimeo. 15cm. LJP-broŝuro 123A. Abundisma. Prezo: 0,75 gld.

Praktika kurso de Esperanto; Skrypt do nauki języka esperanto, Semestr I, Andrzej Pettyn (1937-). Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1977. 70p. Mimeo. 21cm. Prezo: 4,50 gld.

Praktika kurso de Esperanto; Skrypt do nauki języka esperanto, Semestr II, Andrzej Pettyn (1937-). Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1977. 55p. Mimeo. 21cm. Prezo: 4,50 gld.

Praktika kurso de Esperanto (5a parto); Gramatiko, Andrzej Pettyn (1937-). Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1978. 8+173p. Mimeo. 20cm. Prezo: 7,50 gld.

Sciencaj komunikadoj 1978. Red. O. Haszpra. Aldono al "Budapeŝta Informilo", julio 1978. 99p. Ilus. 24cm. Sciencaj artikoloj pri medicino, terminologio, juro, matematiko, arkeologio ktp. de diversaj aŭtoroj, ĉefe hungaraj. Prezo: 13,20 gld.

Yezhadur Esperantek, Erwan ar Menga. Rennes: Hor Yezh, 1978. 72p. 21cm. Serio "Deskomp Esperanteg" 1. Esperanta lernolibro por bretonoj. Prezo 4.80 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,— guldeneoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,— gld.**

Britio

- Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo sukcesis superi dek mil britajn pundojn en la valoro de sia kapitalo, el kies jara rento ĝi helpas vojaĝojn de gejunuloj el Britio al eksterlando. La Fondaĵo jam plurfoje subvenciis ankaŭ la vojaĝojn de la anoj de la Volontula Servo de UEA, laste la partoprenon de la nuntempa volontulo Ian Tarrant en la ĉi-jaraj kongresoj en Bulgario.

Svislando

- Kultura Centro Esperantista aranĝas semajnfinan renkontiĝon la 2an kaj 3an de decembro, okaze de la inaŭguro de la unuaj du domoj (nomitaj laŭ la eminentaj svisaj esperantistoj Ernest Naville kaj Pierre Bovet) de "Gastejo Edmond Privat".

Ĉeĥoslovakio

- "Aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko" titoliĝis la seminario, kiun okazigis Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko por la membroj de sia Scienteĥnika sekcio en la urbo Ŝilina, inter la 6a kaj 8a de oktobro 1978. Kvindek da partoprenantoj aŭskultis kaj diskutis dudekon da prelegoj pri problemoj de utiligo de Esperanto en la laboro de sciencistoj pri diversaj fakaj temoj. Eldoniĝis volumo da seminariaj prelegoj al kiu kontribuis aŭtoroj de 5 landoj. Pri la evento raportis la presagentejo ĈTK, tutŝtataj radiostacio kaj 2 ĵurnaloj. Similaj seminarioj estas okazontaj en ĈSSR ĉiujare.

Pollando

- Rondo de Junaj Esperantistoj de la Ŝtata Infandomo (str. Brzegi 55, PL-80-045 Gdańsk 9, Pollando) aranĝas por la unuaj monatoj de 1979 grandan ekspozicion okaze de la Internacia Jaro de la Infano. Sendu infandeseĝnaĵojn, fotojn, afiŝojn.

Belgio

- "Bond zonder Naam", konata bonfara organizaĵo en Flandrio, al sia telefona informservo aldonos ekde la 15a de decembro ankaŭ

Esperanton. Ĉiu, kiu elektas la belgan telefonnumeron (0)31 - 35 12 65, aŭdos nederlandlingvan kaj Esperantan tekston pri la organizaĵo. Aldone oni povas aŭdi kelkajn pli gravajn novaĵojn el la Movado. Ĉiun duan semajnon oni ŝanĝos la novaĵojn. La numero funkcios tagnakte, escepte de la duhora paŭzo inter la 18a kaj la 20a.

- D-ro Pol Denoël, prezidanto de Belga Esperanto-Federacio kaj antaŭa estrarano de UEA, estis lastatempe invitita prelegi pri "Esperanto – lingvo de komunikado" en Lions' Club de Lieĝo. Tio estis la duan fojon, ke unu el la belgaj filioj de tiu internacia organizaĵo montras intereson pri Esperanto. Dum sia aŭgusta vojaĝo en Japanio, ankaŭ d-ro Tonkin havis kontaktojn kun funkciuloj de tiu asocio, spertanta gravan komunikproblemon en sia internacia agado. Unu el la direktoroj de la organizaĵo vizitis informcele ankaŭ la Centran Oficejon de UEA.

Soveta Unio

- *Sowjetunion heute* (Soveta Unio hodiaŭ), magazino eldonata de la Soveta Ambasadato en Vieno, en sia numero de julio-aŭgusto ĉi-jare aperigis longan intervjuon pri Esperanto kun la fama soveta lingvisto Paul Ariste, membro de la Scienca Akademio de Estonio kaj unu el la anoj de la Redakta Komitato de la faka periodaĵo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*. La intervjuon prizorgis Aleksandro Ĥarkovskij, konata soveta ĵurnalistoj kaj esperantistoj.

- Sepdek kvar personoj el 15 urboj partoprenis la 17an Renkontiĝon de Esperantistoj de Volgo kaj Uralo, en Kujbiŝev, komence de novembro. La programo enhavis seminarion, prelegon por neesperantistoj, kvizon, koncerton, ekskurson ktp.


Aŭstralio

- La internacia servo de Radio Aŭstralio la 15an de oktobro laŭtleĝis longan leteron de aŭskultanto pri la 63a UK en Bulgario. Tiu malofta atento de la aŭstralia eksterlanda radio-stacio okazis en ĝia anglalingva programo.

Fake

Prelegvojaĝoj

- Inter la 7a de oktobro kaj la 6a de novembro ĉi-jare, pastro Albino Ciccanti el Italio faris 49 prelegojn



antaŭ proksimume tri mil aŭskultantoj en ĉ. 15 lokoj de Svedio. Temis pri parola kaj lumbilda prezento de Sankta Francisko el Asizo, pri kiu en

la lastaj jaroj eldoniĝis kelkaj verkoj en Esperanto (v. nian numeron de julio/aŭgusto, p. 141). La prelegoj okazis ĉefe en lernejoj. Eklezia Kle- riga Asocio de Svedio aŭspiciis la prelegvojaĝon, kiun organizis Inter – Agadgrupo por Esperanto, kun- labore kun Eklezia Delegitaro Ler- neja de Gotenburgo. Multaj gazetoj kaj radiostacio raportis pri ĉi tiu tre sukcesa prelegvojaĝo, kiun oni intencas ripeti en aliaj partoj de Svedio (ĉi-foje temis nur pri la ok- cidenta landparto).

Fervojistoj

- Sub la protekto de la urba sena- tano pri havenoj, ŝipveturoj kaj tra- fiko, en Bremen okazis inter la 6a kaj 8a de oktobro la jara ĉefkunveno de GEFA, sekcio de IFEF en FR Germanio. Gazetara konferenco, ra- dio-intervjuo kun GEFA/IFEF-pre- zidanto Joachim Giessner (kiu tie festis 25 jarojn da movada aktiveco), publika informvespero, tio estis la ĉe- faj programoj de la kunveno.

Esperantologio

- Montriĝinte tre populara dum la 63a UK en Varno, la Esperantologia Konferenco havos sian daŭrigon en la 64a UK en Lucerno. Interesitaj esperantologoj sendu prelegpropo- non (kun titolo, kelklinia resumo kaj koncizaj indikoj pri la faka kompetento de la proponanto) al la organizanto, d-ro Detlev Blanke, Charlottenstr. 60 (CLE Esperanto), DDR-108 Berlin, Germana DR, ĝis la 1a de februaro 1979.

Eldonaĵoj

- So Gil-su (Sodemun P.O. Kesto 59, Seoul, Koreo) eldonis la unuan kajeron de *Denaska esperantisto*, haveblan kontraŭ unu respondkupono. Bonvenus kunlaboro por la kajero 2.

Parlamenta agado

- Eskil Svane, dana diplomato, kiu dum pluraj jaroj laboris ĉe la Eŭropa Komisiono en Bruselo kaj siatempe kunfondis la Esperanto-Klubon ĉe la Sekretariato de UN en Nov-Jorko, lastatempe skribis al ni jenon: "En junio 1979 la loĝantoj de la naŭ ŝtatoj-membroj de la Eŭropa Komun- umaro (EK) balote elektos la mem- brojn de la Eŭropa Parlamento; estos la unuan fojon, ke tia rekta elekto okazos. Urĝe necesas, ke la landaj asocioj de la koncernaj naŭ ŝtatoj (Belgio, Britio, Danlando, Francio, FR Germanio, Irlando, Italio, Luksemburgo kaj Nederlando) kontaktu ĉiujn sialandajn kandid- atojn, sendante al ili taŭgan informan materialon pri la lingvo-problemo kaj la solvo per la Internacia Lingvo, demandante ilin pri la sinteno al Esperanto kaj atentigante, ke la membroj de la asocio emas informiĝi pri tiu sinteno antaŭ la balotoj." Ni aldonu ĉi tie la adreson de la Eŭropa Esperanto-Centro (Rue de la Rei- nette 13, Boîte 28, B-1000 Bruxel- les), kiu jam viglas sur la sama agad- kampo kaj kunordigas la laboron.

Filatelo

- Krom la katalogo de Esperantaj filatelaĵoj, kiun eldonis la tiurilata faka movada organizaĵo ELF/AREK (v. nian oktobran numeron, p.186), ĵus aperis *Konciza katalogo de Espe- ranto-poŝtmarkoj*, havebla kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (20 belgaj frankoj) ĉe la Esperanto-Klu- bo "La Verda Stelo", Pastorijsstraat 45, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Informado

- Esperanto-Klubo de Munkeno (FR Germanio) lastatempe intensigis sian informan laboron. Ĝia junulara sekcio partoprenis i.a. junularan in-



formfoiron, kiun vizitis pli ol dudek mil gejunuloj. Ĉiujn kostojn pagis la urbo. Necesis do nur iom da entuzi- asmo kaj organizkapablo.

Interpretistoj

- La anglalingva eldono de *Moskvaj Novaĵoj*, kiu en aŭgusto ĉi-jare en Esperanta suplemento aperigis la novan Konstitucion de Soveta Unio, nun anoncas, ke en la Fremdlingva Instituto "Maurice Thorez" en Moskvo jam komenciĝis trejnado de ĉ. mil interpretistoj, kiuj en 1980

servos al la sportistoj kaj funkciuloj de la Olimpikoj en Moskvo.

Sciencistoj

- "La sciencaj kaj teknikaj pro- blemoj en Esperanto" estos la temo de internacia simpozio de esperan- tistaj sciencistoj, kiu okazos de la 12a ĝis la 16a de aprilo 1979 en Marília, Brazilo (kie okazis pasintan julion la Unua Latinamerika Kon- greso de Esperanto). Pliaj informoj pri la simpozio estas haveblaj ĉe: prof. Wilson Ferreira Martins, Caixa Postal 556, BR-17 500 Marília (SP), Brazilo.

Televido

- Maloftas programoj tiel favoraj al Esperanto, kiel tiu prezentita tut- lande en Jugoslavio la 6an de okto- bro. Filmita diversloke en la lando, ĝi elsendis dum 30 minutoj fruves- pere, en tre konvena tempo, abund- ajn informojn pri ĉiuj aspektoj de la internacilingva fenomeno. Oni skizis la historion de la lingvo, ĝiajn evolu- on, literaturon, nuntempan staton. Estis intervjuitaj pluraj personoj, i.a. prof. d-ro B. Popoviĉ kaj mag. Tibor Sekelj. Kromaj temoj tuŝitaj estis multaj: delegita reto, Radio Zagreb, Pupteatra Internacia Festivalo, aga- do de la Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb, porblindula Esperanta gazeto surbendigata en Jugoslavio, laboro de la Internacia Kultura Ser- vo, ktp.

Personoj

Shinoda

- D-ro Hideo Shinoda, honora pre- zidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio, gastis post la ĉi- jara UK ĉe la Budapeŝta Medicina Universitato kaj estis akceptita ĉe ties rektoro. Kun d-ro Shinoda estis ankaŭ du aliaj funkciuloj de UMEA — d-roj Saburo Yamazoe kaj Imre Ferenczy, kiu intervjuis la gaston por la Hungara Radio.

Waringhien

- Komence de decembro prof. G. Waringhien, prezidanto de la Akade- mio de Esperanto, transdonos al la Eldonejo TK/Stafeto la manuskrip- ton de la kvara volumo de siaj eseoj,

kiu aperos en 1979 sub la titolo *1887 kaj la sekvo*. Ĝi konsistas el 18 esperantologiaj studoj pri, interalie: Zamenhof — skizo de biografio; ide- ologia dramo de Zamenhof; inkunab- loj de Esperanto; kulisaj manovroj (Ido-skismo); polemikoj ĉirkaŭ vortaroj; lingvo kaj stilo de Zamenhof; evoluo de la vortrezoro; kiel oni faras vortaron. Rimarkindas granda produktivo de prof. Waringhien dum la lastaj jaroj, kiuj alportis liajn trad- ukvolumojn *La ĥimeroj*, *La renesan- ca periodo* kaj *La trofeoj*. Li jam pretigas la kvinan esevolumon kaj novan libron de tradukoj el la franca poezio. Dume, el Irano oni atendas la alvenon de *Poemoj de Omar Kaj- jam* en la traduko de prof. Waring- hien.

YVONNE THOORIS (1889-1978) mortis la 21an de septembro en Oostkamp, apud Brugge, Belgio. Ŝi aliĝis al la loka E-grupo en 1906 kaj estis ties prezidanto ekde la fino de la Unua Mondmilito ĝis la jaro 1946. Inter la du mondmilitoj ŝi estis ankaŭ vicprezidanto de la Reĝa Belga Ligo Esperantista. Ŝi estis honora prezidanto de la loka E-grupo en Brugge.

RENÉ LAVALLÉE (1916-1978) la 2an de junio forpasis en Artigues, Francio. Li lernis Esperanton en 1914, instruis ĝin i.a. en Alĝerio, funkciis kiel delegito kaj fakdelegito de UEA kaj estis funkciulo en la loka (Bordeaux) kaj regiona Movado.

KJELL OFFERDAL (1915-1978), fakdelegito de UEA en Bergen, Norvegio, forpasis en aprilo ĉi-jare, post 45-jara aktiveco en la Movado.

SUZANNE MINAULT (1896-1978) mortis la 21an de junio en Niort, Francio, kie ŝi dum multaj jaroj estis delegito de UEA. Ŝi lernis Esperanton dum sia junaĝo en Parizo kaj poste gvidis multajn kursojn, ankaŭ korespondajn.

H.C. TIMMER (1910-1978) forpasis la 2an de oktobro en Groningen, Nederlando. Nur kelkajn semajnojn antaŭ sia morto ŝi pagis dumvivan kotizon al UEA, konsciante pri sia grava malsano.

IVAR RUNFELDT (1903-1978), fakdelegito kaj multjara membro de UEA, forpasis la 13an de septembro en Karlstad, Svedio.

GUSTAV R. JOHANSSON (1899-1978) forpasis la 19an de septembro en Karlstad, Svedio, kie li estis delegito kaj loka peranto de UEA dum pluraj jardekoj.

Dek titoloj de TK/Stafeto

Ibsen: **BRAND**, drama poemo en traduko de E. Haugen. 353p. 21,00 gld.

Francis: **LA GRANDA KALDRONO**, originala romano. 592p. 42,00 gld.

Chiussi: **JE LA FLANKO DE LA PROFETO**, originala esaro pri Islamo. 362p. 33,00 gld.

Varankin: **METROPOLITENO**, originala romano. 252p. 24,00 gld.

Boatman: **LA NEKONATA KONATO**, originala romano. 121p. 6,60 gld.

Potts: **LA NOVA BUTIKISTO DE NUKUGAIA**, originala novelaro. 250p. 15,00 gld.

Gilbert: **PLANLINGVAJ PROBLEMOJ**. 98p. 10,50 gld.

Auld: **LINGVO KAJ ALIAJ ARTOJ**, originala esaro. 216p. 18,00 gld.

Tagor: **PRIMICO**, poemaro en traduko de P. Daŝgupto. 114p. 10,50 gld.

Heredia: **LA TROFEOJ**, poemaro en traduko de G. Waringhien. 220p. 12,00 gld.

LA LIBROSERVO DE UEA ESTAS LA ĈEFA DISTRIBUANTO DE ĈIUJ TK-ELDONAĴOJ.



Oficiala Informilo

N-ro 520

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

FR Germanio: Bruno Vogelmann.

DONACOJ 1978 (Gld.)

ĝis la 31a de oktobro

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO: F.R. Germanio: B. Vogelmann 92,23. Sumo ĉi-jara: 221,83.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: FR Germanio: M. Kossolobow 10,00; B. Vogelmann 222,43. Nederlando: H. C. Timmer 18,00. Sumo ĉi-jara: 2 910,92.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: B. Vogelmann 92,23. Usono: Ĝ. Harabaĝiu 103,00. Sumo ĉi-jara: 2 151,12.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Anonima: 250,00. Sumo ĉi-jara: 413,00.

ĜENERALA KASO: Aŭstralio: D. Strgačić 88,37. Finnlando: L. Vuolo 89,32. Nederlando: W. Akkerman 27,84. Svislando: S. Reverdin 67,92. Diversaj malgrandaj: 21,96. Sumo ĉi-jara: 11 054, 74.

PATRONOJ DE TEJO: 24 A. Orsolini, Belgio.

AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Belgio: G. Wolff 1 000,00. Sumo ĉi-jara: 2 278,19.

Al ĉiuj tre koran dankon! **UEA**

ekzameno

e Redaktas: B. Golden, Csikász u. 11.III.3 H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 23

(pri la demando vidu nian novembran numeron)

1. "La najtingalo"
2. Alaŭdo. La titolo de la poemo estas "Alaŭdeto" (El Boheme). Francisco Valdomiro Lorenz faris la tradukon.
3. Kakatuo. La unuakta groteskaĵo *La verda kakatuo*, esperantigita de Johann Schröder, estis eldonita en 1912.
4. Hirundoj. *La hirundlibro*, elgermanigita de Helene Wolff, aperis en 1924.
5. Cigno. En la dekkvara kanto de *Kalevala*, Lemminkäinen malsukce-

**Se por la Libro-tago
ĉiu almenaŭ legus unu
Esperantan libron...**

sis mortigi la cignon kaj li mem estis mortigita. La Esperanto-traduko de *Kalevala* fare de Joh. Leppäkoski estis eldonita en 1964.

6. Vanelo. D-ro Kiebitz klarigis al Pierre Touchard, ke lia familia nomo estas la germana ekvivalento de *van-neau* en la franca lingvo.

7. Kanario. La teksto troviĝas en la libreto *Simplaj floroj* (2a eldono 1969), kaj la kanto aŭdeblas sur la disko *La feliĉo* (represo 1969).

8. "La Korvo" estis publikigita en *Esperanto*, julio-aŭgusto 1969. Per ĝi la tradukinto gajnis la unuan premion por traduka poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1968.

9. Merlo. La kolekto de poemoj *Merlo sur menhiro* estis eldonita en 1974.

10. *La mevo*.


DEMANDO 24

(la respondo aperos en nia januara numero)

Esperantistoj, por profesiaj celoj aŭ okaze de vojaĝoj, uzas plej diversajn transport-rimedojn. Kvin el ili konsistigas la temon de tiu ĉi demando.

1. Ernest Archdeacon (1863-1950), pariza advokato kaj aktivulo en la

franca Esperanto-movado, interesiĝis pri ĉiuspecaj sciencaj aferoj, i.a. la fotografio, kartografio kaj aŭtomobilismo. Li pioniris ankaŭ en sia tempe tute nova medio por veturado. Kiujn aparatojn li konstruis?



La rajdanton koncernas unu el la ĉi-kunaj demandoj. Atentu! Li estas sur malĝusta "veturilo"!

2. Carlo Bourlet (1866-1913), la redaktoro de la fama kultura periodaĵo *La Revuo*, estis profesoro pri la mekaniko en la Konservatorio de Artoj kaj Metioj en Parizo. Li celis

apliki siajn matematikajn kaj mekanikajn sciojn al la solvo de praktikaj problemoj. Unu el liaj teknikaj inventoj estis destinita al veturilo uzata universale en la mondo. Pri kiu trafikilo temas?

3. Valdemar Langlet (1872-1960), unu el la pioniroj de la Esperanto-movado en Svedio, estis la unua esperantisto, kiu entreprenis longajn vojaĝojn helpe de Esperanto. Unu el tiuj vojaĝoj okazis en Ruslando en 1897. 36 jarojn poste li travojaĝis Hungaron sammaniere. Kiun transport-rimeton li uzis?

4. Joseph R. Scherer (1901-1967), svis-devena usona esperantisto, instruis Esperanton kaj fondis klubon en Los-Anĝeleso kaj estis prezidanto de la landa organizaĵo en Usono. En la jaroj 1933-1936 li faris prelegvojaĝon en Usono kaj priskribis siajn travivaĵojn en libro, kies titolo enhavas la nomon de la veturilo, kiun li uzis. Kiel li vojaĝis?

5. Jean Ribillard (1904-1962), eks-majoro de la franca afrika armeo, estas konata pro sia libro *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud* (1963), romano pri filozofema azeno. En sia profesia vivo, Ribillard ne rajdis sur azeno, sed uzis alian beston. Kiu besto portis lin?

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

Oficistino dez. kor. tutmonde: f-ino Ela Poltavskaja 77/33, SU-314004 Poltava, Ukraino, Soveta Unio.

26-jara dentisto, d-ro Mohamad Pezeshki, Kh. Narvan, Kh. Shirokhorshid, Karaj, Irano, deziras korespondi tutmonde.

16-jara junulo volas korespondi kun samaĝulo, prefere el sud(oriant)a Eŭropo: Robert Cuperus, Parksingel 16, 9909 PM Appingedam, Nederlando.

La LKK de la 22a Aŭstralia Esperanto-Kongreso volas lui filmojn pri venontaj kongreslandoj, la movado, ktp. La kongreso okazos Januaro, 1980. Bv. respondi al A.E.A., Poŝtkesto 415, Manly, 2095, Aŭstralio, kun detaloj kaj kostoj.

48 DIAPOZITIVOJ por prelegi **PRI** Esperanto. Nur por antaŭmendintoj. Informas Lentaigne, 3, av. Gaillarde, F-34000 Montpellier, Francio, kontraŭ respondkuponon, koverto kun adreso.

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ, 2a eldono (XVI+320+10 paĝoj), favore akceptita de la Esperanta gazetaro, necesa por ĉiu serioza esperantisto. Mendojn akceptas aŭtoro: Isaj Dratwer, Bat Jam, Poŝtkesto 3396, Israelo kaj Libroservoj. Prezo: 30,00 ned. guld., plus 10% sendokostoj.

Ricevu liston de senkopirajtaj teĥnikaj artikoloj. Skribu al ELA, P.O. Box 17627, Ft. Worth, TX 76102, USA/Usono.

Pri ŝako deziras korespondi: Walde-mar Kozłowski, Al. Rew. Paźdz. 230, Pl-43-100 Tychy, Pollando.

Aperis la dua kaj ĉefa informilo pri la 35a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Legantoj de *Kontakto* baldaŭ ricevos la informilon. Aliaj interesitoj petu ĝin de: 35a IJK, Postbus 4083, 9071 EB Groningen, Nederlando.

La 22a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazos en Sidnejo 1980 01 02 ĝis 09. Informoj haveblaj ĉe: Aŭstralia Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 415, Manly, 2095, Aŭstralio.

Ĉu ne valoras daŭrema informo pri solvo de internacia problemo bileton por kinejo? Mendu la broŝurojn de d-ro Hartl laŭ oftaj anoncoj.

Argo Beverloo (Mr. Hamersstraat 35, 3438 BT Nieuwegein, Nederlando), 14-jara knabo, serĉas korespondantojn tutmonde, per bildkartoj, pri poŝtmarkoj ktp.

Ni dankos informojn pri lue- aŭ pruntepreneblaj Esperantaj filmoj: Esperanto, Filologia Fakultato, Santiago de Compostela, Hispanio.

Indekso 78

REVUO ESPERANTO, OFICIALA ORGANO DE UEA,
71a JARKOLEKTO, NUMEROJ 865-876

Administrado 110
Afganistano 85
Afriko 69, 89, 94
Aleksiev, N. 149
Amouroux, J. 197
Antunes, J. 40
Argentino 24, 143, 205
Arolovič, V. 162
Asakaŭa H. 65
Auld, W. 130, 199, 219
Aŭstralio 64, 126, 221
Aŭstrio 36, 85, 185
Balech, E. 140
Bastert, J. 145
Belartaj Konkursoj 15, 117, 130,
163, 176-178, 182, 199
Belgio 64, 143, 202, 221
Benczik, V. 162, 170
Bernasconi, E. 56
Bibliografio 34, 57, 81, 101, 142,
184, 201, 220
Bibliotekoj 85, 127
Blanke, D. 162
Bociort, I. 154, 193
Böðvarsson, Á. 162
Boia, A. 162, 193
Bolivio 25
Boulton, M. 98
Bratanov, K. 154
Brazilo 24, 59, 64, 84, 104, 143, 160
Brennan, A. 2
Bril, I.J. 40
Britio 36, 85, 204, 221
Bulgario 71-76, 82, 149-151, 154,
163, 164, 166, 168
Cappa, G. 22, 55, 141
Carlevaro, T. 80, 219
Casey, A. 55, 105
Castellvi de Heider, P. 86
Cavanagh, B.M. 179
CED 2, 120
Centra Oficejo de UEA 168
Chang Chi Cheng 153
Chiussi, I. 139
Ciccanti, A. 221
Conterno, C. 33, 98
Cseh, A. 85
Cushing, J. 166
Ĉeĥoslovakio 84, 221
Ĉilio 25
Ĉinio 17, 104, 126, 129, 153, 170,
171
Ĉočov, V. 162
Dall' Acqua, V. 180
Damjanov, V. 144

Danlando 64, 127
Daŝgupto, P. 219
Delcourt, M. 197
Delegita reto 62, 110, 127
Denoël, P. 28, 221
Diego, F. de 9
Diplomatia 41, 129, 144, 152
Dobrzyński, R. 132
Drezen, E. 197
Edukado 30, 65, 92, 117, 161
Egami, F. 18
Ekspozicioj 64, 84, 113, 126, 165,
204
Eksteraj rilatoj de UEA 22, 114,
129, 156, 191-193
Ekström, E. 145
Ekvadoro 17, 25
Ekzameno E 19, 39, 67, 87, 107,
146, 187, 206, 223
Eldona agado 36, 90, 110, 127
Eldonaĵoj:
 Al vi de mi 55
 Ĉevalido transiras riveron 200
 De tempo al tempo 80
 Don Quijote 9-13
 Elektrolitoj 179
 Elementa zoogeografio 140
 El la vivo 90
 El popola Ĉinio 65
 Epifanio 219
 Eseo pri Ido 80
 Esperanto 1, 111
 Esperanto-dokumentoj 13, 120
 Esperanto, rivoluzione de la pa-
 rola 180
 Eŭropa dokumentaro 18
 Faktoj kaj teorioj. . . Esperanto
 aŭ Interlingua 56
 Fianĉo de l' sorto 100
 Francisko el Asizo 141
 Frithjof-sagao 80
 Granda kaldrono, La 79
 Grete kaj Jep 56
 Gudrun 219
 Halina-dokumento 200
 Internacia lingvistika simpozio 99
 Izolo 134
 Je la flanko de la profeto 139
 Jen nia mondo 17
 Kaŝita vivo de LLZ, La 98
 Kontakto 118
 Kristnaska triptiko 34
 Latva fabelareto 56
 LPLP 120
 Malgrandaj plantidgardantoj 56

Malmalice 90
Nocioj pri ornitologio 99
Originoj de la vivo 141
Revizoro, La 200
Ribela saĝo 81
Ruza griza lupego 200
Saĝa kapto de granda huzo 56
Sankta Francisko 142
Slovaka antologio 199
Sociopsikologio kaj grupodina-
 miko. . . 219
Tiele parolis Zaratustra 140
Tonio Kröger 34
Tra l' mondo 55
Trigroŝa romano 55
Trofeoj, La 179
Venis viro 33
Verda robo 100
Vilaĝano el Poltavo 200

Esperantologio 15, 65, 162, 192,
222
Estrara raporto 109-125
Eŭropa agado 28, 222
Eŭropa Komunumo 115, 195, 222
Eŭropa Konsilio 29, 115
Evolulandoj 1, 4-8, 22, 25, 69, 89,
93, 94, 130
Faka agado 37, 48, 85, 120, 165
Faka literaturo 1, 4-8, 26
Filatelo 165, 186, 222
Financo 90, 111, 122-125
Finnlando 130, 144
Forster, P.G. 99, 219
Francio 85, 185, 204
Francis, J. 79
Fremdlingva instruado 4, 136
Friis, L. 127
Gádaros, M. 40
Germanio, DR 17, 84
Germanio, FR 36, 84, 102, 202,
204, 221, 222
Gianelias, P. 145
Giorgi, A. de 163
Golden, B. 49, 94, 163 (v. Ekzame-
no E)
Goodheir, A. 37
Grattapaglia, U. 24
Gregor, D.B. 180
Ĝivoje, M. 37, 127
Ĝuĝev, S. 105, 162, 186
Harabaĝiu, Ĝ. 205
Harry, R. 144
Haudebine, M. 63
Heugten, W.A.M. van 34, 81
Hinda Unio 129, 192
Hispanio 64, 85, 126, 143, 204, 205
Historio 70, 143, 172-175, 197, 209
Homaj rajtoj 155, 169, 189, 211
Honoraj membroj 109, 160, 174
Honora Patrona Komitato 109, 173
Hungario 36, 104, 105
IFEF 37, 138, 221
ILEI 89, 127, 144, 185, 204
Imbert, R. 194
Infankongreseto 15, 165

Informado 17, 25, 36, 42, 64, 65,
 77, 84, 85, 104, 113, 143, 169,
 171, 185, 191-195, 204, 205,
 221, 222
 Instituto Hodler 111, 133
 Instruado 85, 185, 193
 Interlingvistiko 17, 36, 105, 127,
 144, 192, 205
 Internacia Somera Universitato 103,
 116, 162
 Interpretado 41, 222
 Irano 1, 4-8, 17, 36, 104, 143, 191
 Isakov, J. 86
 Islando 17
 Israeli, I. 86
 Italio 82, 186
 Izák, L. 163
 Jackson, I. 181, 202
 Jansen, W. 50
 Japanio 18, 36, 49, 64, 127, 131,
 143, 185, 192
 Jegorovas, P. 105
 Jensen, G.R. 219
 Johansson, G.R. 223
 Jong, R. de 163, 177, 200
 Jugoslavio 43, 64, 84, 143, 194,
 204, 222
 Kalendaro de eventoj 60, 142
 Kalocsay, K. 36, 134
 Kanado 64
 Kantonen, L. 163
 Kárpáti, L.G. 162
 Kawamura, S. 141, 162
 Kawasaki, N. 162
 Kehlet, E. 200
 Kindler, H. 28, 204
 King, G. 55
 Kolker, B. 162, 172
 Kolombio 25
 Komencantoj 1, 18
 Komunikado 22
 Kongresoj:
 UK 62a, Rejkjaviko 112
 UK 63a, Varno 15, 35, 83, 92,
 103, 149-168
 UK 64a, Lucerno 182
 IJK 33a, Poitiers 118
 IJK 34a, Veliko Tarnovo 14, 59,
 102, 166, 167
 IJK 35a, Austerlitz 182
 Kongresoj aliaj:
 Aŭstralia 64
 Fervojista 138
 Japana 144
 Latinamerika 24
 Konstantinova, R. 163
 Koreo 204
 Korte, P. 40
 Kotizoj 186
 Krajnov, S.N. 162
 Kubo 48, 84, 185
 Kudrjavickij, I.G. 128
 Kulturo 116
 Kursoj 4-8, 17, 36, 84, 126, 143,
 193, 204

*Se vi estas malnova membro de UEA, kio signifas ankaŭ fidela leg-
 anto de nia revuo, vi jam konas nian belan kutimon sendadi la
 revuon al ĉiuj malnovaj abonantoj ĝis inkluzive marto de la venon-
 ta jaro. Sed, ĉu tiu kredito vere estas necesa? Tiusence:*

*Antaŭdankon
 por la frua pago
 de via kotizo
 por la jaro 1979*


Labortendaroj 31, 85, 204
 Landa agado 24, 48, 84, 89, 119,
 157, 160, 204
 Landmark, M. 162
 Lapenna, E. 43
 Lapenna, I. 210
 Lavallée, R. 223
 Lelogeais, T. 29
 Lernejoj 85
 Lernolibroj 17, 126, 130, 143, 180
 Lesznai, L. 63
 Leteroj de legantoj 58
 Libroj 46, 110, 144
 Lingva diskriminacio 22
 Lingvo 49, 77, 96
 Lingvo-problemo 2, 18, 29, 37, 41,
 63, 90, 136, 155, 189-193, 195,
 196, 197
 Lins, U. 127
 Literaturo 85, 127, 176-178
 Lo Jacomo, F. 48, 65, 96, 162
 Long, K. 163, 176
 Luksemburgo 17, 126
 Lüthi, H. 40
 MacGill, S. 181
 Madagaskaro 89, 204
 Maertens, G. 133
 Maimon, N.Z. 98, 200
 Makkink, G.F. 99, 141
 Malto 160, 185
 Manders, W. 80
 Márton, L. 128
 Matematikistoj 48, 96
 M' Bow, A-M. 90, 136, 151, 152
 Medicinistoj 127
 Meksikio 63, 160
 Membro-statistiko 66, 110
 Mijake, S. 174
 Milojević, S. 14, 46, 69, 71, 89, 129,
 189, 191, 193
 Minault, S. 223
 Moritz, U.J. 210
 Movado 1, 4-8, 14, 21, 24, 69, 84,
 89, 109, 121, 129, 153-161, 170,
 189, 191-193
 Muzeoj 105
 Muzikistoj 18, 37, 65, 163

Nederlando 104, 186, 204
 Nervi, M. 163, 199
 Neŭtraleco 159, 189, 209
 Nikolov, Z. 163
 Nishi, S. 173
 Nisida, R. 145
 Norvegio 36, 132
 Offerdal, K. 223
 Oficiala informilo 19, 39, 65, 86,
 107, 145, 187, 223
 Pakistano 84, 190
 Papo Johano Paŭlo la Dua 205
 Parlamenta agado 25, 104, 138,
 144, 222
 Parzival 69
 Peevski, V. 37, 162
 Pei, M. 86
 Pennacchietti, F. 22
 Periodaĵoj v. Eldonaĵoj
 Peruo 25, 160
 Petrov, P. 63
 Pettyn, A. 92
 Pickel, L. 128
 Piĉ, K. 162, 163
 Pilger, W.F. 34, 56
 Piron, C. 77
 Pollando 131, 221
 Pool, J. 162
 Poplawski, J. 40
 Portugalio 36, 43
 Poŝtmark-kolektado 32, 110
 Prelegvojaĝoj 64, 84, 113, 221
 Premioj 85, 105, 130, 132
 Pupteatro 126, 132, 194
 Quaasteniet, T.M. de 145
 Quarello, D. 145
 Radio 20, 36, 38, 43, 64, 84, 85,
 106, 113, 127, 148, 205
 Ragnarsson, B. 80, 98, 149, 176
 Rajšić, B. 63
 Rakotondravao 89
 Ramírez Teruel, A. 40
 Raveloson, E. 89
 Recenzoj v. Eldonaĵoj
 Regiona agado 119
 Reiersøhl, O. 162
 Rezolucioj 161

Ritterspach, G. 138
 Rosbach, J.H. 100
 Rossetti, R. 84, 134
 Rumanio 126, 129, 154, 193
 Runfeldt, I. 223
 Rybáčková, J. 163
 Sadler, V. 1, 4-8
 Saheb-Zamani, M.H. 4-8, 139
 Schmidt, K.O. 63
 Schulz, R. 80
 Scienco 50-54, 221, 222
 Seminarioj 31, 202
 Setälä, V. 130
 Shinoda, H. 222
 Silber, G. 80
 Simonnet, F. 100
 Skaljer-Race, V. 98, 163
 Skoltoj 85
 Smet, W.M.A. de 99, 162
 Socilingvistiko 37, 186
 Sokalówna, B. 163
 Solzbacher, W. 37, 140
 Soveraj Univ. Kursoj 26
 Soveta Unio 36, 43, 63, 104, 105,
 126, 129, 221
 Spacveturado 50-54
 Sporto 222
 Sproeck, A. 128
 Statuto 89, 109, 160, 209-218
 Stefanović, P. 179
 Støp-Bowitz, C. 26, 140

Strönne, J. 105
 Sud-Afriko 185
 Sud-Ameriko 24
 Sutton, G. 186
 Svedio 105, 186, 221
 Svislando 17, 221
 Sviták, F. 128
 Ŝako 18
 Ŝariatmandari, Ajatula 6
 Ŝtimec, S. 132, 163
 Tammelo, I. 195
 Tančev, P. 150
 Tárkony, L. 172
 Tarrant, I.D. 202
 Teatro 17, 59, 131, 163, 164
 TEJO 14, 31, 59, 82, 102, 117-119,
 166, 167, 181, 202
 Televido 17, 64, 113, 222
 Terminaroj 44, 48, 64, 96, 105, 197
 Thooris, Y. 223
 Timmer, H.C. 223
 Tobusch, H. 86
 Tófalvi, E. 163
 Tolstoj, L.N. 172-175
 Tonkin, H. 21, 65, 104, 129, 149-
 152, 155-159, 169, 180, 191-
 193, 209
 Tonkin, J. 74
 Tradukoj 127
 Transporto 137
 Tzaut, O. 55, 105

UEA:
 Estraro 23, 89, 91, 109, 160, 209
 Komitato 109, 160
 Ullman, P. 9-13
 Umeda, J. 170
 UN 2, 104, 114, 129, 156, 169
 Unesko 8, 37, 90, 114, 151, 152,
 156, 169, 204
 Universitatoj 4-8, 17, 18, 36, 63,
 102, 105, 126, 143, 185, 193,
 204, 205
 Urugvajo 24
 Usono 127, 186, 192, 205
 Valano, J. (pseŭdonimo) 98
 Vatikano 18
 Vatré, H. 79
 Veličković, M. 128
 Venezuelo 17, 25, 129, 160, 185
 Venture, A. 219
 Verloren v. Themaat, W.A. 56, 162
 Vetter, R. 44, 104, 179, 197
 Vjetnamio 126
 Volontula Servo 37, 110
 Waringhien, G. 179, 222
 Wendell, L. 40
 Westenberger, H. 86
 Wolski, L. 163
 Wood, R.E. 65, 192
 Wüster, E. 44-46, 197
 Yamazoe, S. 162
 Zamenhof, L.L. 169, 200



HENRYK SIENKIEWICZ, literatura Nobel-premiito en 1905

Lia fama aventura romano, tradukita
 en ĉiujn lingvojn kaj internacie
 konata dank' al TV-filmo, estas nun
 havebla ankaŭ en Esperanto,
 en la traduko de prof. M. Sygnarski.

315 paĝoj, plus kolora mapo. Prezo: 330 belgaj frankoj,
 21 germ. markoj, 24,00 guldenoj aŭ egalvaloro.

Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ ĉe UEA.

Eldonis: **HEROLDO** en kunlaboro kun Pola Esperanto-Asocio
 DE ESPERANTO

KVIN JAROJ POR ŜANĜI LA DIREKTON

Ni homoj ekeniris akceliĝantan kolizian evoluon kun multaj tutmondaj krizoj, kelkaj nur malklare videblaj. La plej multaj hodiaŭ vivantaj personoj ne eskapos vivante, kaj ni ne menciuj la perdon de libereco kaj abundo, se ne baldaŭ estos establita novaj metodoj por solvi tutmondajn problemojn. Neniam en la historio la homaro devis alfronti tiom da problemoj, kiuj postulas decidojn internaciajn, por atingi viv-subtenajn solvojn; ekz. la ĉiutaga minaco de nuklea milito multiplikita per la disvastigo de nukleaj armiloj kaj laŭ rekta vojo kaj tra la malantaŭa pordo de povo-produktado; natur-media detruigo pro dekoj da kaŭzoj; morto de la oceanoj pro poluo, demografia eksplodo trans la subten-kapablo de la Tero; kreskantaj konfliktoj pri raraj terriĉaĵoj; nutraj- kaj akvokrizoj. Detala listo plenigus paĝojn.

Ni ne havas 25 jarojn por draste ŝanĝi la direkton por eviti katastrofon. Estas dubinde ĉu ni havas 15 jarojn. Povas esti, ke ni ne havas 10 aŭ eĉ 5 jarojn. Et-skalaj aŭ lokaj rimedoj ne povas savi nin kaj pruviĝos tute sentaŭgaj por malhelpi la tuj okazantajn terglobajn katastrofojn. Negocadoj inter suverenaj nacioj pruviĝis kiel senrezultaj ekzercoj, kiuj nun kostas al ni 300 miliardojn da dolaroj ĉiujare por alproksimigi la Juĝ-Tagon.

Kion ni bezonas estas demokratia federa mondregistaro, kiu havas la povon solvi la tutmondajn problemojn por la bono de ĉiuj pere de mondparlamento respondeca al la Teranoj; mondregistaro, kiu samtempe povas konservi kaj plivastigi civilajn liberecojn, eliminante la devigojn de naciaj militismaj prioritatoj kiel ankaŭ la devigojn de kreskantaj terglobaj krizoj. La unua paŝo sur ĉi tiu vojo estas la akcepto de mondkonstitucio, kiu difinas la strukturojn, povojn, limigojn kaj procedurojn de mondregistaro. Tiucele KONSTITUCIO POR TERA FEDERIGO, akceptita de la Asembleo por Mondkonstitucio, estas nun prezentata por ratifikado al la homoj kaj nacioj de la Tero. Ankaŭ akceptita de la Asembleo por Mondkonstitucio estas Kvinjara Plano por la ratifikada laboro kaj por la realigo de la Mondkonstitucio, ĉi tie resumita:

1977/78 Alvoko por Ratifikado de la Konstitucio por Tera Federigo eldonita kaj tutmonde publikigita. La Mondkonsti-

tucio liverita al ŝtatestroj kaj registarestroj de ĉiuj landoj kun peto pri ratifikado. Ago-komitatoj estas establitaj en minimume 20 landoj. Oni preparas ratifikadon per popola referendumo. Kampanjo por kolekti milionon da dolaroj estas lanĉita.

1978/79 La ratifika kampanjo estas intensigata en regionoj, en kiuj favoraj decidoj estas plej probablaj, t.e. en la unuaj kvin landoj, en kiuj oni klopodas atingi ratifikon fare de naciaj registaroj; en la unuaj kvin universitatoj kaj en la unuaj kvin komunumoj aŭ Tutmondaj Elektaj Distriktoj, en kiuj oni komencas tutmondan referendumon por rekta popola ratifiko de la Mondkonstitucio. La venontaj sesioj de la Asembleo por Mondkonstitucio okazas en sud-azia lando, 'ombra mondregistaro' estas anoncita, por formuli leĝdonan programon por la mondo pri gravaj mondproblemoj.

1979/80 La ratifika kampanjo estas ĉiel plivastigata. Oni ankaŭ fokusas la agadon al la elekto de delegitoj al la Provizora Mondparlamento, kiu kunvenu 1980/81. Regionaj Asembleoj estas okazigataj en Afriko kaj Sud-Ameriko. La celo de jara enspezo de miliono da dolaroj estas superata.

1980/81 Regionaj Asembleoj estas okazigataj en Nord-Ameriko, Eŭropo kaj en la Pacifika Regiono. La ratifika kampanjo estas intensigata en pliaj landoj, universitatoj kaj Tutmondaj Elektaj Distriktoj. Provizora Mondparlamento estas kunvenigata kaj preparoj estas faritaj por formi la Provizoran Mondregistaron laŭ Artikolo XIX de la Mondkonstitucio.

1981/82 La provizoraj Mondparlamento kaj Mondregistaro atakas la plej urĝajn mondproblemojn. La ratifika kampanjo estas plilarĝigata kaj intensigata en pliaj landoj. Elektro al la Mondparlamento estas iniciatataj en ĉiuj regionoj, en kiuj la Mondkonstitucio estas ratifikita. Oni preparas la Unuan Funkci-Stadion de la Mondregistaro.

1982/83 La Unua Funkci-Stadio de la Mondregistaro estas atingita kaj realigita, se 25 nacioj aŭ ekvivalentaj Tutmondaj Elektaj Distriktoj ratifikis la Konstitucion por Tera Federigo laŭ la preskriboj de Artikolo XVII de la Konstitucio por Tera Federigo.



**TUTMONDA
DEMOKRATIO
La Racia Alternativo**

**ASOCIO POR MONDKONSTITUCIO
KAJ MONDPARLAMENTO**

1480 Hoyt St., Suite 31
Lakewood, CO 80215, Usono
(303) 233-3548

- ☐ Bonvolu sendi ekzempleron de KONSTITUCIO POR TERA FEDERIGO, por kiu mi sendas \$ 5.00.
- ☐ Bonvolu sendi ekzempleron de CONSTITUTION FOR THE FEDERATION OF EARTH, por kiu mi sendas \$ 5.00.
- ☐ Mi ŝatus aktive helpi al la realigo de la Kvinjara Plano. Kunsendita estas kontribuo de

Nomo:

Adreso:

.....

Lando:..... Dato:.....

(Represo petata)

Halina~ Dokumento

PRI LA STUDENTAJ JAROJ DE ZAMENHOF

konsistanta el tajpkopioj de la ruslingvaj originaloj ĉe Gimnazio kaj Universitato Varsoviaj kaj ilia Esperanta traduko. Tiun valoran dokumentaron pri la vivo de Zamenhof sendis en 1934 Halina Edelbaum el Varsovio al Ĵ. Iŭaŝita en Tokio.

Nun aperas fotorepreso de tiuj dokumentoj kun komentario de Naokazu Kawasaki, akademiano.

230+22 paĝoj, 24x17,5cm. Eldonis: Ĵuntaro Iŭaŝita, 1977.

Mendu ĉe UEA: 45,60 (por Nederlando 47,42) gld., plus sendokostoj 10%.

kontakto

Ĉu vi hazarde aŭdis, ke la abonantaro de

la trimonata revuo de TEJO pligrandiĝis nur ĉi-jare je plenaj 29 procentoj? Ĉu hazarde vi kontribuis al tiu kresko? Se vi estas ne pli ol 25-jara, vi rajtas sen krompago ricevi la revuon pro via membreco en TEJO (UEA). Do, plendu, se tio ne okazas! La pli aĝaj ne fidu hazardon sed intence abonu "Kontakto"-n por 1979 (16,50 gld.)!

SÁNDOR SZATHMÁRI
KAIN KAJ ABEL



Szathmári-verkaro KOMPLETIGITA!

Kolekto de 23 noveloj (pluraj ĝis nun neaperintaj). 288 paĝoj, 19cm.

Prezo: 18,30 gld. Mendu ĉe UEA aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 193, H-1368 BUDAPEST, Hungario.

HUNGARA



VIVO

HUNGARA VIVO estas dumonata kultura revuo, aperanta ekde 1961 en Hungario. Ĉiu numero aperas sur 40 paĝoj, plus kovrilo, en la formato 28,5x20,5cm. Krom la prezento de la klasika kaj nuntempa hungara kulturo, ĝi dediĉas ampleksan spacon ankaŭ al la originala Esperanta literaturo. Sur ĝiaj paĝoj ofte aperas verkoj de Auld, De Kock, Goodheir, Miyamoto kaj aliaj elstaraj figuroj de la Esperanta literaturo.

Abonebla ĉe UEA kontraŭ 17,50 (por Nederlando 18,20) guldenoj.

Ĉina monata gazeto en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

varbas abonantojn de 1979

Periodo de abonvarba kampanjo: Ekde la 1-a de oktobro 1978 ĝis la 31-a de januaro 1979. Ĉiu, kiu faras abonon aŭ reabonon en la varb-kampanjo, povos senpage ricevi unu ekz. de grandformata kolora kalendaro en Esperanto.

Abonprezoj: Por 1. jaro: Gld. 7,00; por 2 jaroj: Gld. 10,50; por 3 jaroj: Gld. 14,00.

Abonvarbado estas bonvena. La abonvarbanto sendu la kolektitajn abonilojn kaj pagojn al la loka peranto, petante ke la lasta notu lin kiel varbanton. Oni ankaŭ povas sendi ilin rekte al la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN. Post plenigo de la aboniloj la abonvarbanto povos ricevi memoraĵojn kun ĉina stilo.

Abonu ĉe : UEA, Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando

aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto:

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN. P.O. Kesto 313. Pekino, Ĉinio

Specimeno akirebla ĉe la ĝenerala distribuanto.



Swissair portas
la mondon
al Svislando
kaj Svislandon
al la mondo.

Oficiala flugkompanio de la 64a UK

